

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1

2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto
ŝ-19034/2000

Perspektive al la nova jaro

En Zhangjiajie

**Samideanoj de TEJO kaj
Hongkong en Pekino**

★ POPOLA ĈINIO



Samideanoj de
TEJO kaj
Hongkong en
Pekino **5**



Mi fotas
miajn
gepatrojn **40**



Senneĝa
skiado en
Pekino

En
Zhangjiajie

34



16




25

Hejmloko
de naŝi-oj

ENHAVO

- 3 **INTER NI**
4 Perspektivo al la nova jaro
8 Por la idealo de Esperanto
10 "Miela monato" en Esperantujo (I)
12 **ESP-NOVAĴOJ**
13 **POR KOMENCANTOJ:**
Averto de montogrimpisto
13 **KORESPONDI DEZIRAS**
14 **TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:**
Aŭtonomaj regionoj de Ĉinio; Administraj distriktoj de Ĉinio
24 **ORIGINALE VERKITAĴ:**
Poemoj el Ukrainio
28 Zhou Tao, TV-anoncistino vaste ŝatata
32 Nubo de Yunnan (Prozaĵo)
36 Signifoplena ora medalo
38 Kampano-papertondisto Zhou He
39 Du satiroj
44 Post transloĝiĝo en urbeton
46 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
48 **SUR NIA LIBROBRETO:**
"La Familio"; "Cent Ĉinaj Fabloj"
49 **KURANTAĴ AFEROJ**
50 **POR VIA SANO:**
Bateti la tutan korpon
51 **ĈINAJ POŝTMARKOJ:**
Poŝtmarkoj pri 12 aĝo-simbolantaj bestoj



Zhou Tao en la vespero "Muzikista Fojnbudo"

Foto de Feng Jin

La 16-an kaj 17-an de oktobro 1999 ĉina TV-anoncistino Zhou Tao kune kun aŭstria TV-anoncisto Karl Moik gvidis la vesperon "Muzikista Fojnbudo" en la Imperiestra Palaco en Pekino. La vespero, okazigita de ORF, CCTV kaj SF-DRS en kunlaboro, estis admirata de la spektantoj.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

INTER NI

EPĈ travivis jam 50 jarojn kune kun la nova Ĉinio. Ni atribuas nian sukceson al la subteno kaj kunlaboro de niaj legantoj. En la pasintaj jardekoj post la fondiĝo de nia gazeto, niaj legantoj neniam ŝparis al ni trafajn proponojn kaj sugestojn. Iuj el niaj legantoj ne povas legi plurajn ĵurnalojn aŭ gazetojn pro okupiteco, sed ili daŭre abonas ekskluzive la gazeton EPĈ; iuj legantoj eĉ larmis, kiam ili devis ĉesi aboni la gazeton pro manko de mono... Kiam niaj neesperantistaj amikoj informiĝis pri tiaj okazaĵoj, ili montris grandan admiron pro la korinklino de niaj legantoj.

Niaj legantoj rigardas EPĈ kiel ponton por interkompreno, solidareco kaj amikeco. Kaj tiu ponto estas konstruita per Esperanto. La 50-jara ekzisto de nia gazeto ja estas propagando kaj demonstro de la internacia helpa lingvo Esperanto. Ni esperas, ke en la estonteco niaj legantoj daŭre donos al ni helpojn en ĉia maniero. La progreso de Esperanto dependas de nia kuna penado.

La Red.

1[496]2000



Kun EPĈ-estraranoj (meze)

vizitas Ĉinion dum sia oficperiodo.

Kvankam en la 14-a de oktobro ni havis nur duontagan kunestadon, tamen okazis ampleksa diskuto pri nova estraro de TEJO, pri la junulara movado en Azio... kaj kompreneble pri IJK en Hongkong. Sjoerd Bosga rememoris la IJK en Koreio: "Ĝi jam ne estas junulara kongreso tradicia kaj kutima por eŭropaj junuloj. Sed la azia kaj korea ecoj donas al la kongresanoj ion novan, ion mirigan." Kiel prezidanto de ĈJEA, kiu kunlaboras kun la Hongkong-a Junulara Esperanto-

Asocio por sukcesigi la IJK en 2000, ankaŭ mi deziras, ke la 56-a IJK prezentu ĉinecon kaj hongkong-econ al la kongresanoj el diversaj kontinentoj.

Post la simpozio en Pekino Sjoerd Bosga venis al Hongkong por renkonti Holger Boos, TEJO-estraranon pri kongresoj, kaj hongkong-ajn LKK-anojn. Ili esploris la junularajn vilaĝojn, kiuj probable funkcios kiel kongresejo. Post lacigaj kunsidoj la du TEJO-estraranoj forflugis kun amaso da novaj impresoj kaj memorindaj amikaj aferoj. Kaj la hongkong-aj LKK-anoj sin ekpreparis por vizito al Pekino, kie laboras la alia teamo de LKK.

la sama lando, tamen pro la grandega areo de Ĉinio kaj aliaj kialoj junaj pekinaj kaj hongkong-aj esperantistoj ne havas multe da ŝancoj por vidi unu alian. Sed per la informiloj kaj korespondaĵoj el Hongkong, la nomoj kiel Jeffrey LI, Gladys MA k.a. jam estas tre amikaj por mi. Ni ĉiuj tre ĝojis pro la unua renkontiĝo de la du teamoj.

Post sinprezentoj ni ĉiuj vigliĝis pro la rapida amikiĝo. Ni havis eĉ tri komunikajn rimedojn: la komuna Han-lingvo por la tuta Ĉinio, la kantona dialekto, kiun ankaŭ la pekinaj junuloj povas kompreni iomete, kaj kompreneble Esperanto, kiu devas esti la laborlingvo por LKK.

La tuta tago estis laboriga. La pekinaj junuloj tre admiras la sukcesan preparan laboron de la hongkong-aj samideanoj — la belaj informfolioj kaj projektoj de glumarkoj, la efike kaj glate funkcia labor-strukturo, la sindediĉantaj kontribuantoj al IJK. La LKK-anoj ĉiuj estas kompetentaj por sia tasko: kasisto Mandy mem profesie laboras en tiu kampo,



Renkontiĝo de s-anoj de Pekino kaj Hongkong

UNUA RENKONTIĜO DE DU TEAMOJ

En la 20-a de novembro dek hongkong-aj samideanoj renkontiĝis kun la pekinaj. Por mi, ili estis nekonataj, escepte de Bill Mak. Kvankam ni loĝas en

la belajn informfoliojn kaj varbilojn prizorgis Grace, kiu estas desegnisto, reto-inĝeniero Herbert montris per sia komputilo la bildojn pri la flughaveno kaj kongresejo, kaj la koloraj fotoj vekis huraon de la rigardantoj.

“UNU KOMITATO, DU TEAMOJ”

Aliĝilo-traktado, informado, varbado, programo — ĉio ĉi bezonas kunlaboron de la du teamoj. La tuta mondo konas la politikon “Unu lando, du sistemoj”, kiu estas bone praktikata en Hongkong post la 1-a de julio 1997. Kaj la Loka Kongresa Komitato de la 56-a IJK konsistas el du teamoj — la pekina kaj la hongkong-a. Por faciligi la interkomunikiĝon, ni planas, ke ĉiumonate Xiang Hong el Pekino sendu al koncernaj personoj cirkuleron pri la ĝenerala progreso. Kiam venos aliĝiloj, Yin Qin el Pekino unue traktos ilin kaj poste detale informos la hongkong-an teamon, kiu kontrolas la pagostaton. Pri programo respondecos Jeffrey Li el Hongkong kaj Li Jia el Pekino, superrigardos Wang Jianbing, kaj ili kontaktiĝos kun Holger Boos el TEJO. Nun la LKK-anoj pri programo petas proponon kaj kontribuon de la tuta mondo. Bonvolu turni vin al ili por montri vian talenton.

Wang Jianbing, adr.: P.O. Kesto 825, CN-100037, Beijing, Ĉinio. Rete: cel@china-report.com.

Jeffrey Li: pathfinder@ctimail.com

Li Jia: cri@gjdt.cri.cngb.com

Nun la detala tagordo de LKK sidas sur nia tablo. Ĝi estas ellaborita de Bill Mak, LKK-prezidanto, kaj la hongkong-a kaj pekina teamoj. Ni esperas, ke per sia partopreno esperantistoj el la tuta mondo flegos kaj sukcesigos la IJK ĉe la jarmila komenco. ■

Vojaĝu al Ĉinio okaze de la 50-jariĝo de EPĈ

Okaze de la 50-jariĝo de EPĈ ni organizos la “Vizit-grupon de EPĈ-amikoj”. Ni proponas al niaj legantoj jenajn itinerojn:

Itinero I, Orienta parto de Ĉinio:

Pekino – Nankino – Suzhou – Hangzhou – Ŝanhajo (16-25 majo 2000)

La itinero komenciĝas de Pekino, kie troviĝas famaj antikvaj konstruaĵoj, kiaj la Granda Muro, Somera Palaco kaj Imperiestra Palaco. En Suzhou kaj Hangzhou estas la plej belaj ĝardenoj de Ĉinio kaj allogaj naturaj pejzaĝoj; kaj Ŝanhajo estas la plej prospera urbo de Ĉinio. Ĉi tiu itinero karakteriziĝas per kunfandiĝo de antikvo kaj moderno. Daŭro: 10 tagoj. Prezo: 400 USD/persono.

Itinero II, Silka Vojo:

Pekino – Xi’an – Lanzhou – Jiayuguan – Dunhuang – Turpan – Urumqi – Kantono (16-30 majo 2000)

Raportoj pri la Silka Vojo aperis en nia gazeto en 1996-1998, kaj multaj el niaj legantoj montris grandan intereson. Laŭ la itinero vi vidos la falangon de terakotaj militistoj kaj militĉaroj, la okcidentan ekstremon de la Granda Muro, la misteran budhan kavernaron en Dunhuang, la senhoman dezerton kaj kolorriĉajn morojn de nacimalplimulto. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 500 USD/persono.

Itinero III, Tibeto:

Pekino – Chengdu – Tibeto (Zedang – Lhasa – Xigaze – Lhasa) – Kantono (16-30 majo 2000)

Tibeto, loko plena de beleco de neĝa altebenaĵo, kun mistera lamaismo kaj riĉa tibeta kulturo, ĉiam altiras al si interesitojn. Daŭro: 15 tagoj. Prezo: 1 960 USD/persono.

Mendu antaŭ la 15-a de aprilo 2000 ĉe la Distribua Fakto de EPĈ.

Tel. kaj telefakso: +86-10-6832 1808

Retpoŝto: epc@china-report.com

Majo estas la plej taŭga monato por turismo en Ĉinio, kaj ĉiu el la supraj itineroj estas rekomendinda. Ne preterlasu la ŝancon. Ni renkontiĝu en Ĉinio.

Redakcio de “El Popola Ĉinio”

Por la idealo de Esperanto

La idealo en Esperanto donis al mi la instigon lerni ĝin. Oni nomas tion la interna ideo de Esperanto

de HANG JUN

EN aŭgusto, kiam la ora aŭtuno sentigis al ni refreŝigan agrablon, Nobel-premiito de 1994 pri ekonomiko profesoro Reinhard Selten laŭ invito de la Ĉina Ŝtata Fonduso por Natursciencaj Esploroj venis al Pekino por ĉeesti la Internacian Simpozion pri Frontaj Fakoj kaj Fakoj Prioritate Financotaj de la Fonduso por Natursciencaj Esploroj. Li kune kun Nobel-premiito de 1976 pri fiziko profesoro Chao Chung Ting, Nobel-premiito de 1996 pri kemio profesoro Harold W Kroto kaj aliaj pli ol 100 sciencistoj diskutis kaj elmetis proponojn rilate al tiuj natursciencaj fakoj prioritate financotaj de Ĉinio por esplorado en la venontaj 5 jaroj.

Posttagmeze de la 24-a de aŭgusto profesoro Selten invitite gastis en la Ĉina Radio Internacia (ĈRI), kies direktoro Zhang Zhenghua intime akceptis lin. Post tio, laborantoj de la Esperanta Sekcio de ĈRI kunsidis kun la gasto en varma etoso. Ĉar profesoro Selten estas ne nur mondfama erudiciulo, sed ankaŭ fidela esperantisto, la interparolo fariĝis aparte intima kaj temis nature pri Esperanto kaj Esperanto-movado.

Profesoro Selten diris al ni: "La idealo en Esperanto donis al mi la instigon lerni ĝin. Oni nomas tion la interna ideo de Esperanto. Hodiaŭ oni ne multe parolas pri ĝi, tamen ĝi ekzistas kaj mi konfesas,

ke mi kredas je la interna ideo de Esperanto."

Li informis al ni, ke ankaŭ lia patro estis esperantisto, sed kiam li komencis lerni Esperanton, lia patro jam forpasis. Kiam li studis en Frankfurto, li ofte vizitis esperantistan grupon kaj konatiĝis kun samideanino Elizabeth, poste ili geedziĝis. Nun ili ambaŭ estas dumvivaj membroj de UEA. En 1995 li fariĝis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. Okaze de la 84-a UK en Berlino li laboris kiel rektoro de la 52-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). Kun granda ĝojo li diris al ni: "La kongreso estis tre sukcesa. En IKU ni havis 8 tre bonajn prelegojn. Dum la kongreso okazis Nitobesimpozio, en kiu partoprenis ankaŭ nemalmultaj neesperantistaj filologoj kaj sociologoj, iuj el ili faris ankaŭ prelegojn. La simpozio donis al ili ŝancon kontakti kaj koni Esperanton. Ĉiuj diskutis pri la lingva problemo, kio estas utila por la solvo de la eŭropa lingva problemo."

Kiam ni diris, ke Esperanto ekzistis jam pli ol 100 jarojn, kaj nun faras klopodadon por la dua cento da jaroj, profesoro Selten serioze diris: "Estas longa vojo, kiun oni ankoraŭ devas atendi. Estas longa vojo, sed ne la fina venko morgaŭ, aŭ venontjare. Oni devas atendi longan vojon kaj ankaŭ ne povas esti vere certa pri la fina venko. Ni tiom zorgas pri la demando, ĉu Esperanto fariĝos fine la dua



lingvo por ĉiu en la mondo, kiom pri la demando, ĉu oni laboras por tio. Se oni ne laboras, ĝi ne realiĝos aŭtomate. Se oni laboras por tio, do oni havas pli da ŝanco por tion realigi. Se oni malmulte laboras, do oni havas malmulte da ŝanco. Tio estas ĝenerala leĝo de la vivo. Esperanto havas bonan perspektivon. Oni faris eksperimenton en lernejo kaj la rezulto montris, ke lerni Esperanton estas la plej bona preparo por lerni alian fremdan lingvon. Oni devas lerni Esperanton unue por lerni alian fremdan lingvon. Tio estas la plej ekonomia, plej scienca kaj plej efika vojo por lerni fremdan lingvon. Pri tio ni devas propagandi energie kaj praktiki. Tio devas ankaŭ esti orientilo de la lingva instruado."

Kiam ni parolis pri tio, ke en la nuna mondo oni ŝajne pli



Prof. Reinhard Selten (dekstre) kaj la aŭtoro

kaj pli akcentas siajn proprajn naciajn lingvon kaj kulturon kaj ne tiom zorgas pri la komuna lingvo, profesoro Selten diris: "Tio ne estas kontraŭaĵo. Oni ja deziras renkontiĝi unu kun alia ĉe la sama nivelo. La neŭtraleco de Esperanto estas grava avantaĝo. Esperanto ne endanĝerigas la malgrandajn lingvojn en la sama maniero kiel la angla lingvo nun endanĝerigas ilin. Nun la angla havas grandan volon en la mondo, sed tio verŝajne ne daŭros por ĉiam, ĉar tio ŝanĝiĝos. En la historio estis ekzemplo. En la komenco de la 20-a jarcento la franca estis la plej grava internacia lingvo, sed tio finiĝis antaŭ la Dua Mondmilito. Post la milito la angla fariĝis la plej grava. Oni ne scias, kiom longe tio daŭros, sed ne daŭros certe por ĉiam, ĉar la nombro de homoj, kiuj

lernebla, precipe en la skriba maniero."

La paroltemo de profesoro Selten nature turniĝis al Ĉinio, ni do petis lin iom paroli pri la internacia simpozio. Li diris: "Mi estas invitita de la ĉina fonduso por naturscienca esploro al Pekino por la simpozio. Ni ne faras decidojn tie. Ni nur donas opiniojn kaj prezentas informojn pri scienca evoluo. Ni diskutas pri diversaj esplorkampoj, baza scienco kaj ankaŭ teknologia esploro, en kiu direkto oni ja konduku la teknologian evoluon en Ĉinio."

Kiam ni tuŝis la nunan staton de scienco kaj tekniko de Ĉinio, profesoro Selten diris, ke en Ĉinio estas vere multaj kapablaj sciencistoj, kaj kredis, ke Ĉinio havos grandan progreson en scienco kaj tekniko kaj la ĉinaj sciencistoj fariĝos pli kaj pli gravaj en la internacia

parolas la anglan, denaske ne estas tiom granda, kaj la aliaj lingvoj, kiel ekzemple la ĉina, estas pli fortaj laŭ la nombro de personoj sed ne laŭ la ekonomia enspezo. En tio la ekonomia signifo ja estas tre grava, sed la ekonomia signifo de aliaj landoj ekster la anglalingva tereno ja kreskos. Ankaŭ la ekonomia signifo de Ĉinio certe kreskos. Oni povas atendi grandan kreskon de la ekonomia forto de Ĉinio. Kaj post 50 jaroj oni havos tie verŝajne unu el la plej riĉaj landoj. Tiam ankaŭ la ĉina lingvo fariĝos tre grava, malgraŭ ke ĝi estas malfacile

sciencistaro, kaj oni povas esti sufiĉe optimisma pri Ĉinio.

Ni informis al li, ke dum la lastaj 20 jaroj Ĉinio persistis en la reformado kaj malfermo kaj ĝuste pro tio multe evoluis. Profesoro Selten diris: "Jes, la reformado certe daŭros. Laŭ mia opinio estas bona afero, ke tiu ĉi reformado estas sufiĉe malrapida. Tro rapida reformado ofte kaŭzas nestabilecon. Komenciĝis jam la reformado ekonomia, ankaŭ la politika reformado devas esti malrapida. En la reformado la ĉina registaro tre akcentas stabilecon, tio estas tre tre ĝusta. Tio estas bona vojo."

Ni informis al profesoro Selten, ke decembre de 1999 35-jariĝos la Esperanta disaŭdigo de ĈRI. Li gratulis nin: "Tio estas tre grava laboro. Bedaŭrinde, mi ne havas tempon por aŭskulti vian radion. Tamen mi scias, ke multaj aŭskultas vian radion. En Frankfurto mia japana amiko okulkuracisto prof. Rokuro Makebe ja ofte aŭskultas vin kaj skribas al vi. Mi ne havas tempon por aŭskulti radion nek faras ion por Esperanto, tamen bonŝance, mi havas la pozicion por iomete apogi ĝin. Esperanto estas nia eterna idealo. Kiam la iealo realiĝos, tio ne estas grava. Gravas tio, ke ni devas klopodi kaj labori por ĝi. Ni ne devas atendi ĝis ĝi realiĝos. Mi pensas, ke eĉ se ĝi ne realiĝos, valoras labori por ĝi, ĉar tio vere estas bona afero. Mi havas tre bonajn impresojn pri ĉinaj esperantistoj. Vi havas gazeton 'El Popola Ĉinio'. Vi havas radiostacion. Tio estas grandaj atingiĝoj. Tio ankaŭ donas multajn amikojn al Ĉinio inter la esperantistaro. Tio valoras por la ĉina ŝtato, ke tiom multaj esperantistoj amike rigardas Ĉinion."

Ĉe adiaŭo ni sincere deziras renkontiĝi kun li en la venontaj UK-oj, precipe en la sekva jarcento dum tiu eventuale gastigota de Ĉinio. ■

“Miela monato” en Esperantujo (I)

En julio kaj aŭgusto pasintjare mi vizitis Eŭropon. Krom renkontiĝo kun atendataj amikoj, ankaŭ multaj neatenditaj konatiĝoj ĝojigis min

de PENG ZHENGMING

EN julio kaj aŭgusto pasintjare mi vizitis Eŭropon. Krom renkontiĝo kun atendataj amikoj, ankaŭ multaj neatenditaj konatiĝoj ĝojigis min. Mia “miela monato” havas du sencojn: Pasloĝante ĉe eŭropanoj, mi ne kutimis al ilia ordinara manĝaĵo—pano kun ŝinko kaj fromaĝo, mi do prenis en la monato nur panon kun mielo; aliflanke, post dekelkajara lernado de Esperanto, tiu ĉi mia unuafoja eksterlanda vojaĝo per nia lingvo fariĝis tiel grava, ke ĝi probable ŝanĝos mian estontecon.

TRI-FOJE, SED NUR OK HOROJN EN PARIZO

Estis frua mateno, kiam la aviadilo atingis Parizon, la mondfaman romantikan urbon, kiu impresis min per pompo de sia lamplumo vidata de supre. Mia ret-korespondanto Marc Noulin kaj lia edzino atendis min ĉe la elirejo de la flughaveno. La pli-ol-60-jaraj geedzoj, kiel emeritaj fervojistoj de Parizo kaj veteranaj SAT-anoj, volontas dediĉi siajn lastajn jarojn al E-movado. Estis nur 3 horoj disponeblaj por mi en Parizo, ĉar mi devis veturi al orienta franca urbo Metz por konferenco. Dank’ al la bona aranĝo de la geedzoj, mi vizitis Parizon en mallonga tempo.

26 tagojn poste, t.e. la 11-an de aŭgusto, mi revenis Parizon post laŭhormontrila vojaĝo en 15 urboj de 5 landoj. Por reagi al



La aŭtoro (maldekstre) kaj aliaj esperantistoj

la afableco de geedzoj Marc, mi aĉetis reiran flugbileton de la 14-a por havi 3 tagojn por bone rigardi Parizon.

Tamen nur 2 horojn poste, mi estis kondukita al la antaŭurbo de Parizo, kie loĝas Marc kaj lia edzino post sia emeritiĝo. En la sekvantaj tagoj ni partoprenis la Parizan Internacian Kulturajn Festivalon, rigardis la lernejon iam vizitatan de Balzac kaj akceptis intervjuon de ĵurnalistoj, kompreneble ni ankaŭ renkontiĝis kun lokaj esperantistoj. La plej ĝojige estis, ke ni veturis kelkajn horojn por viziti la Esperantan Kulturdomon ĉe Bauge, meze de Francio. Tie mi renkontiĝis kun veteranaj samideanoj, kiuj estis diligente laborantaj por la baldaŭ okazonta E-renkontiĝo.

Antaŭtagmeze de la 14-a estis tempo por mi forlasi Parizon. Frumatene Marc vekis min, ke mi ankoraŭfoje rigardu la urbon. Dum 3 horoj ni promenadis en

pluveto sur la placo antaŭ Luvro kaj sur la strato Champs-Élysées, rigardis Eĵfel-turon de proksime kaj foruzis la lastan filmon antaŭ la Triumfarko.

Ĉiam restos en mia sonĝo Parizo kaj la centjara domo de geedzoj Marc, kun ĝardeno, parcelo kaj kelo.

IMPRESO PRI KONFERENCO EN METZ

Metz estas malgranda urbo en la orienta parto de Francio, proksima al Germanio kaj Luksemburgio. Kun malmulta loĝantaro, ĝi geografie similas al la ĉina urbo Wuhan, kie mi loĝas: ambaŭ estas provincaj ĉefurboj, trairataj de fervojo, ĉe kunfluejo de du riveroj.

Laŭ komisiono, samideano Modesto atendis min en la fervoja stacio. Antaŭe ni ne konis unu la alian, tamen li varme akceptis min. Tuj post kiam ni forlasis la

stacion, li regaligis min per franca plado “karehelikoj”. Preskaŭ ĉiun sekvantan tagon li invitis min al tagmanĝo en diversaj restoracioj. Foje refoje mi diris al li dankon pro lia malavara regalo, sed li ĉiam rigardis tion kiel sian honoron. Kvankam ankaŭ mi tiamaniere regaligis samideanojn vizitantajn en Wuhan, tamen ĉi-foje kiel gasto, mi sentis malkvieton. Dum la 84-a UK, la de LKK rekomendita dommastro Jean-Louis Paccou, lia edzino kaj iliaj gefiloj traktis min kiel samfamilianon. Ĉar mi ne kutimas al eŭropa sodakvo, ili donis al mi mineralan akvon ĉiutage.

Nun mi rakontu pri la konferenco.

La Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) estas organizo fondita en 1988 kaj registrita en Metz. Ne posedante sian propran kunvenejon, kia la Esperanta Kulturdomo en Bogue, OSIEK ĝenerale pere de LKK luis lokan publikan kunvenejon. Ĉi-foje ĝi disponis kulturdomon de la urbo. La domo estas regula, kaj tie okazantaj ekspozicioj de pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj spicis nian konferencon.

La alia karakterizaĵo de la konferenco estas nemulteco de partoprenantoj kaj alta nivelo. Preskaŭ ĉiuj ĉeestantoj havis ŝancon kontakti unu alian. Antaŭtagmeze unu aŭ du homoj faris prelegon, kiun sekvis diskuto. Posttagmeze estis ekskurso. En du posttagmezoj ni vizitis Luksemburgion kaj Nancy de Francio. Ĉiufoje post tio estis koncerto aŭ amuza vespero.

OSIEK-prezidanto Eugène de Zilah, lia edzino kaj iliaj infanoj, ĉiuj estas esperantistoj. La geedzoj forvendis sian posedaĵon kontraŭ velŝipo. Sur ĝi ili vivas kaj faras verkadon. “La Gazeto” redaktata de la prezidanto estas altnivela inter la Esperantaj literaturaĵoj. Dum la konferenco lia nova libro priskribanta lian vivon sur la



La aŭtoro kaj s-ro Marc en Parizo

velŝipo estis tre ŝatata de la partoprenantoj.

Menciinde estas, ke ĉina samideano Xie Yuming gajnis la literaturan premion de OSIEK pro sia esperantigo de la klasika ĉina romano “Ruĝdoma Songo”. La romano vekis intereson de la ĉeestantoj; la prezidanto dufoje regaligis min en ĉina restoracio post mia prelego por pli multe koni la ĉinan kulturon; inter la partoprenantoj estas tiu, kiu scias multajn ĉinajn idiotismojn, kaj ankaŭ tiu, kiu dufoje vizitis Wuhan; kaj en la Internacia Kultura Festivalo okazinta en Parizo la prezentado de pekina opero vekis aplaŭdon... Ĉio ĉi tio montras, ke la ĉina kulturo kun longa historio ĉiam altiras al si alilandanojn; kaj Esperanto ludas gravan rolon en interŝanĝo de naciaj kulturoj.

“MONDKONCEPTO” DE JOSE

En OSIEK mi konatiĝis kun Jose, portugala samideano laboranta en la stabo de EU en Belgio.

Jose estas ne nur leganto de EPĈ de antaŭ 20 jaroj, sed ankaŭ ununura alilanda abonanto de “Penseo”, malgranda literatura periodaĵo eldonata de la Hubei-a Esperanto-Asocio. Fakte ni senpage sendis nian gazeton al alilandanoj, sed Jose memvole abonas ĝin por kontribui al la ĉina movado. Kiel nova amiko, li invitis min: per sia aŭto li veturigis min al Bruselo.

Jose laboras por EU kiel tradukisto. Ankaŭ Angelos, unu el liaj kolegoj, estas esperantisto, kiu partoprenis la 71-an UK en Pekino. Kiel membroj de Esperanto-grupo de EU, ili ŝatas konversacii en Esperanto post laboro.

Laŭ invito mi vizitis la hejmon de Jose. Li plej fieras pri sia legoĉambro. Tie estas ne nur lia komputilo

konektanta lin kun la tuta mondo, sed ankaŭ sennombraj E-libroj. Mi rimarkis ankaŭ, ke li estas multescia pri Esperanto kaj ĝia historio.

En lia hejmo ĉie montriĝas lia intereso pri Ĉinio: La infanaj ludiloj preskaŭ ĉiuj produktitaj de Ĉinio; la ĉinaj pentraĵoj sur muroj, la ĉinaj bovloj kaj manĝbastonetoj en ŝranko, la zorgeme konservataj ĉinaj kulinaraĵoj receptoj; eĉ lia komputilo kun memorbanko de ĉinaj ideogramoj, tial mi senprobleme vizitis la hejmapaĝon de nia “Yangzi-jurnalo” kaj ankaŭ ricevis ret-poŝtaĵon senditan de mia filino.

Pere de EPĈ kaj la Esperanta elsendo de la Ĉina Radio Internacia, Jose observas ĉion okazintan en Ĉinio, ekz. Falungong, problemo pri Taiwan kaj inundo de Yangzi-rivero, pri kiuj li havas sian prudentan opinion.

Akcepti samtempe internaciismon kaj naciismon, utiligi Esperanton, portugalan kaj aliajn lingvojn — eble tio estas la “mondkoncepto” de Jose. ■



Kunveno por la 100-a datreveno de la naskiĝo de Chu Tunan

Asocio, cele interkonsiliĝi pri kunago de la 56-a IJK en la jaro 2000 en Hongkong.

BULGARIO

● La 50-a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj okazis en pitoreska urbo Vraca inter la 3-a kaj 5-a de septembro 1999. Celebrita estis same la 90-jariĝo de la loka E-societo "Sukceso" kaj la 100-jara jubileo de Radoslav Trickov, unu el la plej fruaj E-agantoj kun enlanda kaj monda populareco. Krom 98 delegitoj kaj gastoj el 28 loĝlokoj, la kongreson ĉeestis ankaŭ gastoj el Italio, Aŭstrio kaj Hispanio. Renato Corsetti (UEA) faris utilajn rekomendojn rilate antaŭstarantajn taskojn de la movado. Estimata estis same la partopreno de Ljubomir Trifonĉovski, ĝenerala redaktoro de "Literatura Foiro", Svislando. (Hristo Manolov)

ĈEĤIO

● La klubo de vojaĝistoj Hanzelka kaj Zikmund Globe Prosimerice, ĉefa organizanto de infana krea plastikarta kaj literatura konkurso "La infanoj kaj la mondo", volonte tra EPCĉ invitas pluajn malgrandajn pentristojn, verkistojn, aŭtorojn de vojaĝskizoj kaj fotografistojn ĉu individue aŭ kolektive al ilia konkurso. Verketojn de infanoj, krom aprezado, ili uzadas al ornamado de domoj por pensiuloj, de oficialaj ĉambroj kaj koridoroj en lernejoj

kaj urbodomoj, kaj literaturajn verkojn en iliaj broŝuroj kaj katalogoj. Do preskaŭ ĉiuj verketoj trovos konforman akcepton. Oni atendas viajn in-

ĈINIO

● La 12-an de novembro 1999 personoj de diversaj rondoj de Pekino kunvenis en la Popola Halo memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de s-ro Chu Tunan, fama ĉina socia aktivulo, pioniro de la popola kultura afero de Ĉinio por amikeco kun la eksterlando kaj unua prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto".

● La 6-7-an de novembro 1999 okazis en la Nordokcidenta Agronomia Universitato en Shaanxi-provinco la 1-a Konferenco pri Agrikulturo kaj Medio en Esperanto. Ĝin ĉeestis 13 ĉinaj esperantistoj kaj inaŭgurajn vortojn donis profesoro Io Chou, fama entomologo de Ĉinio. S-ro Huang Yinbao, ĝenerala sekretario de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio (IAEA), kaj s-ro Shi Chengtai faris prelegon. S-ro Takeuti Yosikatu, membro de la Komitato de Azia Esperanto-Movado, ĉeestis la konferencon kaj vizitis s-ron Io Chou kaj lian entomologian muzeon. S-ro Bruno Najbaro, prezidanto de IAEA, kaj d-ro Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA, alsendis gratulajn leteron

kaj telegramon. (Shi Chengtai)

● La 7-an, 9-an kaj 20-an de septembro kaj la 1-an kaj 30-an de oktobro 1999 la Ĉina Poŝta Administracio emisiis poŝtmarkoseriojn "La 125-jariĝo de Universala Poŝta Unio", "La Internacia Maljunula Jaro", "La 50-jariĝo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco", "La 50-jariĝo de la Ĉina Popola Respubliko — Nacia Unuiĝo" kaj "La 10-jariĝo de la Praktikado de la Espera Konstruo". La Filatela Kompanio de Haikou de Hainan-provinco lanĉis unuatagan stampilon en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La stampoj estis desegnitaj de s-ro Zhang Linrui. (Zhang Linrui)

● La 14-an de oktobro 1999 s-ro Sjoerd Bosga, prezidanto de TEJO, vizitis la redakcion de EPCĉ, profitante la okazon ĉeesti kunvenon en Pekino. Li intervidiĝis kun s-ro Yu Tao, prezidanto de la Ĉina Junulara Esperanto-



Sjoerd Bosga (dekstre) kaj Yu Tao

teresajn verketojn. Kveta kaj Jaromir Polakovi, CZ-671 61 Prosimerice 149, Ĉeĥio.

(Kveta kaj Jaromir Polakovi)

FRANCIO

● La tria internacia renkontiĝo de Plouezec, organizita de Roger Eon kaj de Esperanto-22, okazinta de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 1999 estis plene sukcesa. Aliĝis al ĝi 90 personoj, el kiuj 15 estis infanoj 7-17-jaraj. 4 kursoj estis organizitaj: Post tiu sukcesa aranĝo jam prepariĝas la 4-a renkontiĝo okazonta de la 19-a ĝis la 25-a de aŭgusto 2000.

(Louise Rigault)

MEKSIKIO

● Filio Meksikio de la Internacia Akademio de la Sciencoj (IAS) estis leĝigata en Meksikio kiel Civila Asocio en 1999. La unua kongreso okazos en Celaya (proksime de Meksikurbo) inter 21-23 de aprilo 2000, kaj estos honorata de prof. Helmar Frank, prezidanto de Eŭropa IAS. Mondkonata prof. Karl Pribram ankaŭ prelegos en la kongreso pri "Lumo, videblo kaj planeda konscio". D-ro Gustavo Vega (nacia direktoro), d-ro Ruben Feldman-Gonzalez M.D. (prez. Fondinto), <103163.3356@compuserve.com>

Esperanto-kurso en mezlerneja lernejo en Pale, Srpska.

(Mico Vrhovac)

RUSIO

● La 26-an de septembro 1999 en Ivanovo sukcese pasis la Unua Lingva Festivalo. La aranĝo allogis pli ol 170 personojn, ĉefe studentojn kaj pli aĝajn lernejojn. Dum la festivalo estis prezentitaj 19 lingvoj, Esperanton prezentis Irina Gončarova (Moskvo) kaj Aleksej Besčastnov (Kineŝma).

(Andrej Ananjin)

● POR KOMENCANTOJ

Averto de montogrimpisto

de LIU YANMIN

U montogrimpisto, sen oksigena botelo, plurfoje trairis "mortan zonon por montogrimpado" 6 500 metrojn super la marnivelo kaj atingis la kulminon de Qogir, la dua alta montopinto de la mondo. Lia sukceso estis notita en Guinness en 1993.

Estis granda deziro por montogrimpistoj atingi Qogir sen oksigena botelo. En 1881 la kulminon atingis iu kun oksigena sako. Sed neniu sukcesis en tio sen oksigeno, ĉar en la loko 6 500 metrojn super la marnivelo estas maldensa aero. Dum grimpadon oni devas ofte halti por spiregi almenaŭ 10 minutojn. Sen helpo de oksigena botelo, estas neimageble atingi la kulminon 8 000 metrojn super la marnivelo.

Tamen tiu grimpisto sukcesis. Por realigi sian deziron, li cerbumis kaj fine malkovris la misteron de senoksigena grimpadon. Ricevinte Guinness-diplomon, li diris: "Mi opinias, ke avido estas la plej granda malhelpo, ĉar proksime al la kulmino eĉ malgranda avido konsumas multe da oksigeno. Antaŭ ol atingi la kulminon, oni devas forpeli ĉian avidon por rezervi oksigenon necesan por la kvar membroj en la maldensa aero.

Multaj ne spertis montogrimpadon nek medion kun malmulte da oksigeno, sed eble iagrade trenis sian malriĉan vivon. Ĉu vi tiam ne rimarkis, ke oni certe ne povas atingi la kulminon de sia vivo kaj kariero, se granda monavido kaj ĝuemo okupas lian penson? ■

● KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

★ KOMENCANTO — tre interesa internacia revuo. Poŝtkesto 132, Ekaterinburg, 620041, Ruslando.

★ Membroj de Sumgaita Esperanto-Klubo, kiuj kredas al unusola Dio, volas korespondi kun esperantistoj tutmondaj. Adr.: Esperantistas'

Club, Narimanov street, Kvartal 3, ev 8/19, m. 18, Sumgayit, 373200 Azerbaijan.

★ S-ino Nora Paegle, 32-j. dommastrino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: "Faunpurinos", P/N Faunsvirlauka, LV — 3033, Felgavas Raj, Latvio.

★ F-ino Vita Laua, 36-j. ĝardenkulturistino, dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: "Fepos", P/N Krustakmens, LV — 4418, Revelos, Gulbenes Raj, Latvio.

★ S-ro Fulvio Scarpa dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Fondo Versace, 89100 Reggio, Calabria, Italio.

Aŭtonomaj regionoj de Ĉinio

Alia sugesto rilatas al aŭtonomaj gubernioj. Ĉu validas raportoj pri ili? Kian aŭtonomecon ili havas?

Luiz Mario Santos da Silva (Brazilo)

ĈINIO estas unueca lando kun 56 nacioj. La specimena enketo farita en Ĉinio al 1% de la loĝantaro en 1995 montras, ke la nombro de la han-oj atingis 1099.32 milionojn, konsistigantajn 91.02% de la loĝantaro de Ĉinio, kaj tiu de la 55 nacimalplimultoj 108.46 milionojn, konsistigantajn 8.98%.

Egaleco, unuiĝo kaj kuna prosperiĝo de la 56 nacioj estas baza principo de la ĉina registaro por trakti la rilatojn inter la nacioj. Laŭ tiu principo nacimalplimultoj praktikas aŭtonomecon en sia regiono, nome sub la gvidado de la centra registaro ili starigas sian aŭtonoman registaron. Ili havas aŭtonomecon kaj administras siajn proprajn aferojn. Nun krom la 5 aŭtonomaj regionoj, nome la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio (starigita la 1-an de

majo 1947), la Ningxia-a Hujnacia Aŭtonoma Regiono (starigita la 25-an de oktobro 1958), la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono (starigita la 1-an de oktobro 1955), la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono (starigita la 5-an de marto 1958) kaj la Tibeta Aŭtonoma Regiono (starigita la 9-an de septembro 1965), troviĝas ankaŭ 30 aŭtonomaj subprovincoj kaj 120 aŭtonomaj gubernioj. En iuj malgrandaj nacimalplimultaj regionoj la ŝtato starigas nacimalplimultajn subguberniojn, ke la tieaj nacimalplimultoj povu ĝui aŭtonomecon same kiel alilokaj nacimalplimultoj. La loka popola registaro kaj loka popola kongreso estas aŭtonoma organo de aŭtonomaj regiono, subprovinco kaj gubernio. Prezidantoj de la konstanta komitato de loka popola kongreso kaj tiuj de loka registaro estas

elektitaj inter lokaj nacimalplimultaj civitanoj.

Aŭtonoma gubernio supre menciita de la leganto estas administra distrikto samnivela kun ordinara gubernio, ekz. la Changbai-a Kore-nacia Aŭtonoma Gubernio de Jilin-provinco.

Krom la rajtoj samaj kiel tiuj de samnivela registaro, aŭtonoma distrikto havas ankaŭ rajton fari leĝon laŭ siaj propraj naciaj politiko, ekonomio kaj kulturo kaj mem administras aferojn edukan, sciencan, kulturen kaj higienan. Por kulturi nacimalplimultajn kadrojn kaj diversajn fakulojn la ŝtato donas al nacimalplimultoj multajn avantaĝojn, ekz. studi en altlernejoj kaj nacimalplimultaj institutoj. La centra registaro ankaŭ finance subtenas tiujn lokojn por disvolvi iliajn ekonomion, kulturon kaj aliajn aferojn. ■

Administrataj distriktoj de Ĉinio

Mi petas "El Popola Ĉinio" trakti la temon pri la administra kaj geografia disdivido de Ĉinio.

Zdenek Hrsel (Ĉeĥio)

ĈINIO praktikas sistemon de tri-nivela administrado de provinco, samnivela aŭtonoma regiono kaj municipo; aŭtonoma subprovinco (subregiono), aŭtonoma gubernio, gubernio kaj urbo; kaj sub-

distrikto, nacia subdistrikto kaj urbeto. Kaj aŭtonomaj regionoj, subregionoj kaj gubernioj estas lokoj, kie nacimalplimultoj mem administras siajn aferojn.

La ĉina konstitucio diras, ke se necese, la ŝtato povas starigi

specialan administran distrikton rekte sub la centra registaro.

Ĝis la 20-a de decembro 1999, Ĉinio havas 23 provincojn, 5 aŭtonomajn regionojn, 4 municipojn kaj 2 specialajn administratajn distriktojn.

municipo, provinco aŭ aŭtonoma regiono	ĉefurbo	areo (mil km²)	numero de loĝantoj (mil) ĝis la fino de 1996
Pekino		16.8	12590
Tianjin		11.3	9480
Ŝanhajo		6.2	14190
Chongqing		82	30020
Hebei-provinco	Shijiazhuang	190	64840
Shanxi-provinco	Taiyuan	156	31090
Liaoning-provinco	Shenyang	145.7	41160
Jilin-provinco	Changchun	187	26100
Heilongjiang-provinco	Harbin	469	37280
Jiangsu-provinco	Nankino	102.6	71100
Zhejiang-provinco	Hangzhou	101.8	43430
Anhui-provinco	Hefei	139	60700
Fujian-provinco	Fuzhou	120	32610
Jiangxi-provinco	Nanchang	166.6	41050
Shandong-provinco	Jinan	153	87380
Henan-provinco	Zhengzhou	167	91720
Hubei-provinco	Wuhan	187.4	58250
Hunan-provinco	Changsha	210	64280
Guangdong-provinco	Kantono	186	69610
Hainan-provinco	Haikou	34	7340
Sichuan-provinco	Chengdu	488	84280
Guizhou-provinco	Guiyang	170	35550
Yunnan-provinco	Kunming	394	40420
Shaanxi-provinco	Xi'an	205	35430
Gansu-provinco	Lanzhou	450	24670
Qinghai-provinco	Xining	720	4880
Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio	Hohhot	1183	23070
Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono	Nanning	236.3	45890
Tibeta Aŭtonoma Regiono	Lhasa	1220	2440
Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono	Yinchuan	66.4	5210
Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono	Urumqi	1600	16890
Speciala Administra Distrikto de Hongkong		1.095	6310
Speciala Administra Distrikto de Makao		0.0235	430
Taiwan-provinco		36	21300

Ĉinio kun vasta teritorio longas 5 500 km de la suda fino ĝis la norda, kaj larĝas 5 200 km de la orienta ĝis la okcidenta. Kutime oni nomas la regionon norde de Yangzi-rivero norda parto de Ĉinio kaj tiun sude de la rivero — suda parto de Ĉinio, tamen en geografio oni uzas la riveron Huaihe norde de Yangzi kiel dislimon. La klimato de suda Ĉinio tute diferencas de tiu de la norda.

Pro diferencoj de klimato kaj geografia situo la norda kaj suda partoj de Ĉinio havas malsamajn morojn kaj tradiciojn.

La topografio de Ĉinio malleviĝas kiel ŝtuparo iom post iom de la okcidento al la oriento. Oni nomas la ĉemarajn provincojn kaj municipon orienta parto de Ĉinio, kiu estas pli evoluinta ol la centra kaj okcidenta partoj de Ĉinio. La ĉina registaro jam faris planon

por disvolvi ilin.

Ĉinio havas multajn provincojn, municipojn kaj aŭtonomajn regionojn, ege diferencajn inter si en ekonomio, kulturo kaj geografio. Laŭ iliaj ekonomia kaj kultura proksimeco kaj geografia situo oni dividas ilin en 7 regionojn: nordorienta Ĉinio, norda Ĉinio, orienta Ĉinio, centra Ĉinio, suda Ĉinio, sudokcidenta Ĉinio kaj nordokcidenta Ĉinio. ■

En Zhangjiajie

EN 1992 Zhangjiajie estis enlistigita en la nomaron de mondaj heredaĵoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

La 7-an de majo 1992, altrangaj specialistoj de Unesko vizitis Zhangjiajie. Ili serioze esploris la lokon kaj kun neretenebla ĝojo admiris: "Ho, kiel belegaj la pejzaĝoj! Mirinde belegaj!" Ili opiniis, ke Zhangjiajie komplete konformas al la kondiĉoj postulataj por esti "monda heredaĵo" dank' al siaj belaj naturaj pejzaĝoj, bone konservita ekologia sistemo, harmonia kuniĝo de la naturaj kaj kulturaj objektoj. Post nelonge la loko estis enlistigita en la nomaron de mondaj heredaĵoj.

La nomita heredaĵo kortuŝis multajn vizitantojn. Japana pentristino diris: "Antaŭe mi pensis, ke la ĉinaj pejzaĝaj pentraĵoj estas el fikcioj, sed nun mi estas certa, ke Ĉinio vere havas mirindajn pejzaĝojn. Zhangjiajie mem estas kolosa pentraĵo!" S-ro Shen Congwen, fama verkisto el okcidenta Hunan-provinco, diris: "Zhangjiajie estas ideala loko por poetoj. Tie ĉio estas poezia."

Fakte Zhangjiajie estas ne nur poezia pitoreskejo, sed ankaŭ valora donaco de la naturo por la ĉina nacio kaj la tuta homaro. Ĝiaj ĉarmaj montoj, klara akvo, raraj bestoj kaj prosperaj arbaroj estas nemankigeblaj por la medio de la homa vivo. Tial en la tempo, kiam la ekologio de la tero alfrontas danĝeron kaj la homoj unuvoĉe alvokas por protekti la ekologian medion, mi vizitis la lokon kaj klare ekkonis ĝian valoron kaj konsciis la homan devon ĝin protekti.



Loko plena de mirindaj pejzaĝoj

NIA aŭto iris jen en nuba maro jen en monta valo, kaj pro la zigzaga irado ni preskaŭ perdis la kapablon distingi la direkton, kvazaŭ ni irus en natura labirinto. Apikaj montoj staras kiel vertikale hakitaj kaj ĉio elspiras majestecon.

La plej majesta estas Tianzi-monto. Tiutage ni estis transportataj per telferoj kaj vidis multege da kuriozaj montpintoj, kiuj staras kiel spadoj skrapantaj la densan nubaron kaj rigardantaj rekte al la blua ĉielo. Ni silente sidis en la telferoj kaj kuntiriĝis pro timo, tamen ni spertis la

majestecon de Tianzi-monto.

Tie en ŝtona arbaro ĉielskrapas ŝtonaj arboj, ĉarmas sveltaj ŝtonaj bambuoj, kreskas dikaj ŝtonaj fungoj... Inter la amasego da ŝtonaj floroj petolas ŝtonaj leonoj, tigroj, testudoj, leporoj... Eventuale ni povus ripozi sur ŝtona seĝo kaj dormi en ŝtona domo, ekster kiu staras ŝtonaj gardistoj. Ĉio tio estas farita de la naturo!

En Zhangjiajie akvo estas nedisigebla de montoj. En valoj troveblas lagoj, ĉe montpiedoj lirlas riveroj, ĉe krutaĵoj bruas akvofaloj kaj en ravinoj fluas rojoj kaj el fontoj ŝprucas akvo. Ĉio ĉi multe plezurigis nin kaj akompanis nin en la vizitado...

Antaŭ ni aperis profunda valo ĉirkaŭita de krutaĵoj. La akvo kondukas rekte al subtera rivero, kies profundececo estas malfacile sondebla. De sur la krutaĵoj malsupren torentas akvofalo, kaj staras antikvaj arboj kiel kolosaj ombreloj. Laŭ la krutaĵoj etendiĝas natura ŝtona ŝtuparo. Oni volis malsupreniri por esplorado, tamen terurigis de la tondra plaŭdado. En la ravino ne helpas poŝlampo, tie densas nebulo kaj tondras akvo. La ravino nomiĝas Dia Halo. Kiom ĝi profundas kaj kiom ĝi longas? Neniu scias. Oni povas supozi ĝian mirindecon nur laŭ la gigantaj staŭroj (*Staurois ricketti*) kaj megalobatrakoj (*Megalobatrachus davidianus*), iam ripozantaj sur rokoj.

Du trionoj de la spaco de 369 kvadrataj kilometroj de Zhangjiajie estas tute misteraj kaj tie neniam vidiĝis homa spuro, kio pliigis al la loko primitivan sovaĝecon. Kaj tia beleco apartenas ankaŭ al la sennombraj kavernoj. En la kaverno Flava Drako ŝvebe malsupreniras akvo el 3 fontoj 60 metrojn altaj sur la kaverna tegmento, kaj tion formis tralikado de la subtera rivero. Tie vivas raraj vitrecaj fiŝoj, kies prapatroj vivis surtere. Eble por protekti sin kontraŭ rabobestoj aŭ pro ŝanĝiĝo de

terkrusto ili fariĝis loĝantoj de la kaverno. En mallumo iliaj okuloj fariĝis superfluaĵoj kaj pro tio degeneris. Pro manko de lumo malaperis ankaŭ la pigmentoj protektantaj la internajn organojn kontraŭ ultraviolaj radioj kaj tial la fiŝoj fariĝis blindaj kaj travideblaj kun fortaj antenoj. Sciencistoj diris, ke la evoluo de la blindaj fiŝoj en la kaverno daŭris almenaŭ dekmilojn da jaroj. Ankaŭ ili estas natura heredaĵo, utila por esplori la vivestaĵan metamorfozon kaj interrilatojn inter la vivestaĵa formo kaj medio. La natura leĝo pri progreso de utilaj kaj degenero de senutilaj klare montriĝas en ili. En la kaverno ĉio estas longviva. Iu ŝtona pinglo havas historion de 200 mil jaroj kaj nun ĝi altas 19.2 metrojn. Kelkaj semoj en ŝtonoj eĉ ĝermas, prilumate de fluoreskaj lampoj. La tempo kreis ankaŭ la monton Ŝtona Instrumento...

Kiamaniere naskiĝis la mirindaj pejzaĝoj de Zhangjiajie? La naturo per subtraho kreis ŝtonajn arbarojn sur kvarca stratumo. Pro erozio la supraj ŝtonaj tavoloj iom post iom krevis

kaj la disfalintaj pecoj forportiĝis de fluanta akvo kaj sur la ebena tersurfaco aperis kvadrataj montoj, malprofundaj sulkoj, valoj kaj poste grandaj ravinoj kun apikaj montpintoj kiel ŝtonaj pingloj. Kompreneble ankaŭ kvadrataj montoj povas fariĝi ŝtonaj arbaroj, tamen tio okazos eble post milionoj da jaroj.

La naturo per adicio kreis kavernojn kaj kuriozajn rokojn sur kalkŝtona stratumo. Ĉar kalkŝtono entenas abundon da kalcia karbonato facile solvebla en akvo, tial fluanta akvo faris en la stratumo kavernojn kaj estigis en ili stalagmitojn kaj stalaktitojn. Pro la kontinua akvofluo la stalagmitoj kaj stalaktitoj kuniĝas kaj transformiĝas en ŝtonajn kolonojn, kurtenojn kaj akvofalojn... Oni diris, ke formiĝo de tiaj mirindaĵoj bezonas milionojn da jaroj.

En valoj kaj ĉe krutaĵoj de Zhangjiajie estas ankaŭ fosilioj de konkuloj. Tio montras, ke antaŭ 380 milionoj da jaroj tie estis senlima maro. Por sciencistoj la naturaj pejzaĝoj de Zhangjiajie estas kompleta historio de tersurfaca kresko. ■


Verda mondo


ZHANGJIAJIE estas la plej frua arbara parko en Ĉinio. Tie oni sentas, ke la ĉielo, la tero kaj la suno estas verdaj kaj ankaŭ la homoj mem kunfandiĝas kun verdo. 97.7% de la loko estas kovritaj de arbaroj kaj sekve de tio en la aero absolute ne estas polvo. La aero odoras aroman sovaĝan herbon kaj spirado estas granda ĝuo. Eksterlanda oficisto pri meteologia esplorado diris: "Se Zhangjiajie vendus aeron, el tio ĝi profitus rimarkinde."

Tiu regno de vegetaĵoj ja estas giganta bazo por produkti oksigenon. Tie kreskas 500 specoj

da drogherboj, utilaj al digestado, al kuraco de apopleksio, al toniko por hepato kaj renoj, al mildigo de temperaturo, al sentoksigo... Tie kreskas ankaŭ pli ol 300 specoj da raraj arboj. Davidio (Davidia involucrata) kun blankaj kolomboformaj floroj estas nomata viva fosilio de prahistoria vegetalo. Iliaj samklasanoj pereis antaŭ 20 000-30 000 jaroj en la glacia epoko de kvaternaro, tamen en Zhangjiajie ili postvivis la historian ŝanĝiĝon. Tie prosperas diversaj floroj kaj arboj kaj eĉ sur la krutaĵoj tute sengrundaj kreskas maljunaj lianoj, primitivaj arboj kaj musko...

En Zhangjiajie





Sur la kvadrata monto Heicongnao kun krutaĵoj en ĉiuj flankoj kreskas multege da abioj. En la 70-aj jaroj iuj grimpis sur ĝian pinton kaj, enirinte la arbaron, tuj dronis en dika tavolo de putrintaj folioj. Ili vidis, ke tie serpentoj, bestetoj kaj sovaĝaj birdoj estas teruritaj pro ilia surpriza alveno.

La vasta primitiva arbaro estas ideala loko por sovaĝaj bestoj. Kiam la 300 specoj da floroj energie teksas buntajn fabelojn, aro kaj aro da papilioj ŝvebas por svatado. Ankaŭ la papilioj bele sin vestas kaj serĉas amatojn. La sovaĝaj floroj estas svatantoj por la homoj. Ili komunikas la koron de gejunuloj, tiel ke la geamantoj feliĉe geedziĝas. Tiam ankaŭ kukoloj estas okupitaj. Ili laŭte krias por urĝigi la semadon. Ili estas okupitaj ankaŭ en kaptado de fiinsektoj por kuraci la arbojn, tial ili ne havas tempon konstrui neston por si mem kaj metas siajn ovojn en la neston de aliaj birdoj. Tie vivas tiaj kokoj, kiuj havas grandan sakon sub la kolo. Kiam ili soifas, ili iras al rojo por plenigi la sakon per akvo. Post tio ili revenas hejmen ŝanceliĝe. Sako da akvo sufiĉas por 4-5 tagoj. Aŭtune, arbaro ĉiutage okazigas "bankedon" por tiaj bestoj, kiaj makako, ĉamo, moskulo kaj sovaĝa bovo, kaj birdoj amantaj berojn. Tial la

semoj de tiuj fruktoj dissemiĝas tra la montoj. La termitoj estas danĝeraj malamikoj de la arbaroj. Ili reproduktiĝas rapide kaj volas damaĝi per mordado ĉiujn arbojn en unu nokto, tamen la sendentaj manisoj ne lasas ilin tion fari. Per sia pinta buŝo ili povas trabori teron kaj manĝi termitojn...

La arbaroj estas utilaj al la homoj, kaj la bestoj defendas la arbarojn. En rilato kun la arbaroj, la bestoj estas pli bonaj ol la homoj. La bestoj estas favoratoj de arbaroj kaj ankaŭ iliaj gardantoj.

Arbaro estas infano de monto kaj akvo. La arboj per siaj interplektiĝantaj radikoj firmigas

monton kaj grundon kaj ŝanĝas la falintajn foliojn en konsistigan parton de humo. Ili domaĝas akvon kaj retenas 75% de la pluvo, por ke ĉi tiu poste malrapide vaporiĝu kaj la putoj kaj riveroj ne sekiĝu. Ili filtras 25% de la pluvo, por ke la klariĝinta akvo iru en riveron.

La arbaroj verdigas la montojn kaj purigas la akvon. La verdaj montoj kaj la klara akvo admirigas multajn vizitantojn. Vizitinte la pejzaĝan galerion Suoxi, iu poetino diris: "Mi volas fariĝi roko en la dua vivo kaj edziniĝos al la akvo de Suoxi." Mi ankaŭ preferas esti malgranda herbo por firme kroĉi min al la senlima arbaro. ■

Montanoj


EN la valoj ĉie aŭdiĝas birdokanto, sed malofte vidiĝas homo. Eĉ se vi hazarde renkontas kamparanojn kaj iras kune kun ili, la kuna irado daŭras mallonge. Ili iras tre rapide eĉ kun korbo surdorse. Mi pensas, ke tia lerteco eble estas denaska.

Tie vivas multe da naci-malplimultanoj, el kiuj 70% estas tuĝja-oj. La prapatroj de tuĝja-oj

vivis en kaverno kaj oni nomis ilin kavernaj loĝantoj.

Kompare kun tuĝja-oj sur ebenaĵoj, tiuj loĝantoj sur montoj estas malaltaj, sed bravaj. Tio eble kaŭziĝis de la medio. Dum transiro de ravino sinkroĉado al lianoj bezonas kuraĝon, sed alta staturo estas maloportuna. Maljunulo, vendanta montajn produktaĵojn ĉe antikva vojo, diris al mi, ke valoraj drogherboj kreskas plejparte sur krutaĵoj. Por pluki ilin, oni devas ligi sian talion per ŝnuro al arbobranĉo sur krutaĵo. Kaj oni devas ankaŭ havi kelke da kupraj moneroj ĉe si. Kiam oni ne havas lokon por la piedoj sur krutaĵo, oni povas meti moneron en la rok fendon kaj firme kroĉi sian dikan piedfingron al la monero. Fininte la kolektadon en iu loko, oni trapezas super la abisma valo kaj atingas alian lokon. La maljunulo diris al mi ankaŭ, ke en arbotruoj ofte vidiĝas fluga rato ĉ. unu metron longa, kiu mordas ne homojn, sed ofte ŝnuron ligitan al arbo. Tial por kolekti drogherbojn, estas bezonataj





almenaŭ du homoj: unu gardas la ŝnuron kaj la alia malsupreniras. Mi vidis iajn fungojn sur lia stando. Li diris, ke ili kreskas sur krutaĵoj. Ili estas sanigaj por homaj okuloj kaj utilaj por kuraci heptatan kanceron.

La tuĝja-oj kore dankas la naturon pro ĝia riĉa doto. Ili domaĝas ĉiun parcelon kaj kulturas maizon, rizon kaj kapsikon sur ĉia loko utiligebla. De la 1-a ĝis la 15-a de la unua monato laŭ la ĉina luna kalendaro, ili dancas la dancon maogus por peti benon de la dio. Tia moro estas prahistoria. La dancantaj viroj, tute nudaj, vestas sin per pajlo kaj alivestas sin kiel primitivaj homoj maogus. Ĉe la komenco de la danco ili kantas por kulto la ĉielon, teron kaj dion de greno kaj poste per siaj kanto kaj danco prezentas meritojn de la prapatroj. Sur la subventro de ĉiuj dancantoj pendas pajla bastono, simbolo de vireco. Laŭ tuĝjia-oj la pajla bastono estas dotita de la dio, kaj en la dancado ili per la pajla bastono prezentas ekspluatadon de tero, kaptadon de fiŝoj,

ĉasadon de bestoj, edziĝon... Ili dancas krude, sed humure por gajigi la dion, kiu garantios al ili riĉan rikolton en la venonta jaro.

Dum diligenta laboro sur altaj montoj oni ofte pasie blekas kiel tigroj kaj simioj. Tiam fiŝistoj, arbohakistoj kaj drogo-kolektantoj, ĉiuj eĥas la sonon, kiu ŝvebas super la arbaro, valo kaj krutaĵo...


Se oni diras, ke la tuĝja-aj viroj estas bravaj pro monto, do la virinoj estas spritaj pro akvo. Ili trinkas fontakvon kaj havas belajn okulojn kaj harojn. Kiam ili kun brulligno surdorse iras ĉe roĵo, tio do formas belan pejzaĝon. Ili kolorigas ŝtofon per indigo, brodas sur vestoj desegnojn de fiŝoj, birdoj kaj diversaj belaj floroj, tio estas hieroglifo plena de amo al la naturo kaj bondeziro al la vivo. Se virino brodas tiujn vortojn sur alplandaĵoj, tio ja fariĝas ŝia am-letero. En printempa vespero ŝi donacas tiajn alplandaĵojn al la viro, kiu kantas tutan nokton por ŝi, kaj la viro alkroĉas ruĝan floron al ŝiaj nigraj haroj. Tiamaniere ili enamiĝas. Kaj de


tiam la floroj akompanas ilin la tutan vivon... Post jardekoj, kiam forpasas unu el ili, la vivanto do metas freŝajn florojn antaŭ la nomtabulon de la mortinto kaj petas gekantistojn kanti "Disĵeti Florojn". Sorĉisto disĵetas freŝajn florojn ĉirkaŭ la mortinto, por ke ties animo iru en la mondon de bonodoraj floroj... Tiam la maljuna vivanto ĉesas malĝoji kaj rememoras denove la mielan vesperon.

La 35-jara Qin kaj lia edzino gefianĉiĝis ĝuste tiamaniere. Nun la geedzoj havas malgrandan restoracion en Jinbianxi-valo. En la restoracio oni povas ĝui lokajn bongustaĵojn. S-ro Qin diris al mi, ke antaŭe la gastamaj tuĝja-oj regalis la vizitantojn per ĉasaĵoj kaj poste ekkonis, ke la bestoj estas amikoj de la homoj, tial ili ne plu persekutas la bestojn nek arbitre hakas arbojn. Nun la lokanoj preparas manĝaĵojn per natura gaso. La tuĝja-oj estas fieraj pro la belaj pejzaĵoj de Zhangjiajie. Por danki la riĉan doton de la naturo, ili bone protektos la belajn naturajn pejzaĵojn. ■




Antaŭ 380 milionoj
da jaroj tie estis
senlima maro





En Zhangjiajie



Poemoj el Ukrainio

de VLADIMIR ĤODIN

Zamenhof

En malgranda pol' urbeto
Iam loĝis la knabeto,
Multe pensis li kaj legis,
Al homaro helpi strebis.

Fariĝinte kuracisto kaj estante
humanisto,
Kreis lingvon li por homoj,
Tre logikan, belan, bonan!

Pasis jaroj... Esperanto sonas
kiel bela kanto!
Flugas ĝi de l' kor' al koro,
Malgraŭ limoj, maroj, montoj.

Kaj en ĉiu kontinento
Flugas la facila vento,
Brilas arde verda stelo,
Vivas Zamenhof' ideo!

Dum UEA-kongreso

En Palaco homoj svarmas,
De l' feliĉ' okuloj larmas,
Esperanta parolado, brakumado
kaj kisado!

— "Vi el kiu lando venis?
— Ĉu vi longe min atendis?
— Iru ni kaj registriĝu!
— Ni finfine renkontiĝis!"

Granda Fest' esperantista,
Kaj neniuj estas trista,
Ĉiu estas en medio de la Rondo
Familia!

Al Vasilij Eroŝenko

Mallongan vivon Vi travivis,

Verdire, mi al vi envias,
Vi vidis multon, ne vidante,
De l' lando al la land' migrante.

Kaj ĉie amikar' verdstela
Al la movado tre fidela,
Kun Vi intencis renkontiĝi,
Kaj poste, nepre amikiĝi!

Vi lasis bonajn rememorojn,
Belajn kaj vivajn, kiel floroj,
Poeto kaj esperantisto,
Kaj ankaŭ granda humanisto!

de VILJAM VASILJOVIĈ
ZATJORA

En somerzenito

Altas ĉirkaŭ lago scirpa muro—
Malhelverda — ŝajnas ĝi velura.
Stagnas, ne movetas akva glato,
Kvazaŭ inter scirpoj vitra strato.

Akvo diafana kaj sonora
En ĉemara lago senangora,
Akvo malvarmeta, vivodona
En varmega tag' somersezona.

Altas ĉirkaŭ lago scirpa muro,
Tintas foli-glavoj en obskuro.
El profundo, el obskuro tiu
Blankaj cignoj naĝas en gracio.

Rondoj larĝaj kuras laŭ la vasto
Diversflanken, nehaltige, haste
De l' fieraj birdoj cente, mile—
Regas ĉie paco kaj trankvilo.

Altas ĉirkaŭ lago scirpa muro,
Altas super ĝi ĉiellazuro.
Kaj en akvo speguliĝas ĉio:
Scirp', ĉiel' kaj cignoj en gracio.

Oni diros: Kia ĉi novaĵo —
Scirpoj, cignoj, akva ebenaĵo?
Sed en simpla terbeleco tia
Entenatas la saĝeco Dia.

Antaŭ sunsubiro

Jam transpasita vivkulmin'
Plej bonaj jaroj forflugintaj.
El la spegul' rigardas min
Okuloj lacaj, paliĝintaj.

Ne hastu vi al mi, maljun':
Ankoraŭ ami mi ne ĉesis.
Kaj ne subiru mia sun':
Ne ĉion fari mi sukcesis.

Tag' februara

Tago sunplena, frosta, grizhara...
Staras en prujno arboj ĉe l' maro,
Staras—silentas, kvazaŭ pentritaj,
Kvazaŭ de peza pens' absorbitaj.

Disto dormetas en dolĉa langvoro.
Brilas ĉiel' super ĝi senkolora...
Tago belega, kvieta kaj klara—
Neripetebla tag' februara.

Dezirata gast'

Demetas jam glacian veston tero,
Leviĝas sun', klariĝas monda
vast' —
Animo sentas: venas primavero,
Plej dezirata kaj plej kara gast'.

Alvenos gast' — enuoj tuj
formortos,
En mia kor' naskiĝos ĝoja
kant'.

La primaver' al mi saluton
portos
De mia jun' el malproksima
land'.

Hejmloko de naŝi-oj

La landlima urbeto Dayan estas hejmloko de naŝi-oj


Teksto de ZHANG XUEYING

Fotoj de LIU SIGONG

EN araneaĵaj kampoj troviĝas fruprintempa verdo punktita de helflavaj kolzofloroj kiel saltantaj muziknotoj, kiuj alportis al ni surprizan ĝojon. Kelkaj dometoj kun blankaj muroj kaj nigraj tegoloj dissemiĝas en la kampoj. La verdo etendiĝas al la piedo de monto. En la alia flanko de la monto estas hejmloko de naŝi-oj — landlima urbeto Dayan de Lijiang-gubernio, Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio.

Norde kaj okcidente de la urbeto estas montoj, kiuj baras la frostan venton en vintro, kaj sudoriente etendiĝas ebenaĵo, ke en la urbeto ne tiom varme eĉ en somero.

Rigardante malsupren de la monto, ni vidis nigrajn tegmentojn preskaŭ sen interspaco. La domoj konstruiĝis



Rivereto en la urbeto

laŭ deklivo. Malnova duetaĝa ligna domo ĉirkaŭita de korto aspektas simpla kaj kvieta. La plej eleganta parto de la naŝi-a konstruaĵo estas pordo kun suprenlevita alero, sur kiu estas skulptitaj arboj, floroj, birdoj kaj bestoj.

La strato estas mallarĝa kontraste kun la vasta korto, ke nur 3 aŭ 4 homoj povas iri ŝultron ĉe ŝultra. En la centra parto de la urbeto estas rektangula placo Sifangjie, komerca centro jam de la antikveco. Ĉiuj stratetoj kondukantaj al la placo estas pavimitaj per kolorriĉaj ŝtonoj de Lijiang.

Klara neĝakvo de la Monto Yulong fluas laŭ akvovojoj laŭlonge de stratoj. Formiĝis multaj ĝiaj branĉoj ĉirkaŭ domoj. Okcidente de Sifangjie estas rivero. Pro ĝia alta pozicio oni konstruis kluzpordon destinitan por ellasi akvon por purigi la stratojn. La kutimo longe restas.

Tie ne mankas pontetoj. Salikoj ŝirmas la elegantajn pontetojn. Ĉiuj familioj havas fruktarbojn, verdajn herbojn, grandajn kaj malgrandajn florpotojn, kaj la aromo kaj diversaj koloroj plenigas la korton. Naŝi-oj rigardas la naturon kiel sian fraton. Dum transloĝiĝo ili unue plantas arbojn kaj poste aranĝas meblojn.

En fruprintempa posttagmezo brilas la suno kaj lirlas la rivero.



Maljunuloj ripozas kaj ĉarpentistoj gaje babilas. Apud la rivero juna fremdlandano legas libron trinkante teon. Kiel multaj aliaj fremdlandaj turistoj, li ŝatas loĝi en la antikva urbeto, sed ne en moderna luksa hotelo. Naŝi-oj estas gastamaj. Se vi estas agrabla, ili invitas vin en sian hejmon kaj prezentas al vi etmanĝaĵojn. En la urbeto troviĝas malgrandaj restoracioj, dekoritaj kiel naŝi-a hejmo. Klientoj mem portas pladon, kaj la manĝaĵoj estas bongustaj.

Vespera bazaro estas ankoraŭ prospera, antaŭ ĉiu stando lumas lampo. Maljunuloj ŝatas rigardi Dongba-dancon kaj aŭskulti antikvan naŝi-an muzikon, kiun oni nomas "viva fosilio".

Junuloj preferas popmuzikon. Ilia nupto havas okcidentan koloron: la novedzo portas eŭrop-stilan kostumon kaj la novedzino gazan robon, sed ili sekvas la tradicion de festonado. Naŝi-oj laboras en la butikoj ofte ĝis profunda nokto por gajni pli da mono. Ili povas negoci per simplaj femdlingvaj vortoj kun fremdlandanoj, kaj ĉi tiuj ŝatas naŝi-ajn metiartaĵojn. Iliaj agmaniero kaj vestoj montras al la naŝi-oj, ke ekster la urbeto estas nekonata mondo, sed la naŝi-oj neniam volas forlasi sian hejmon. ■

Loĝanto en sia korto




Maljunaj loĝantoj



Ŝi rakontas la historion de la urbeto.

Lignaj pontetoj sur rivereto inter loĝdomoj





Strato de la antikva urbeto

Zhou Tao, TV-anoncistino vaste ŝatata

Teksto kaj fotoj de LING YOUJUAN

Zhou Tao, unu el la plej famaj kaj ŝatataj anoncistoj de la Ĉina Centra Televida Stacio, diplomiĝis el la fakultato por parolistoj de la Pekina Radiodisaŭdiga Instituto. De 1993 ĝis 1995 ŝi laboris kiel parolistino pri novaĵoj kaj anoncistino de alia programero en la Pekina Televida Stacio. En 1995 ŝi eklaboris en la Ĉina Centra Televida Stacio kaj gvidis la programeron "Mozaiko de Distroj" telesendatan en ora tempo. Rapide ŝi konkeris la publikon per sia eleganta labor-stilo. Ŝi gajnis la oran premion de la Unua Konkurso pri Disaŭdigaj kaj Telesendaĵoj kaj fariĝis unu el la "Cent Tutlandaj Elstaraj TV-anoncistoj". La 16-an kaj la 17-an de oktobro 1999 Zhou Tao kune kun s-ro Karl Moik, TV-anoncisto el Aŭstrio, gvidis la vesperon "Muzikista Fojnbudo" en la Imperiestra Palaco en Pekino kaj akiris brilan sukceson.



Zhou Tao
kaj ŝia
belligistino



Sur strato



En la hejmo



Kun
alilandaj
kolegoj



En kuirejo



Kun
knabineto




En ĝardeno



En gvidado de
"Mozaiko de
Distroj"





"Ni aĉetu tiun libron."



Aĉeto



En Venecio



En la vespero
"Muzikista
Fojnbudo"

Nubo de Yunnan

(Prozaĵo)

La nubo de Yunnan signifas ne nur naturan nubon, sed ankaŭ la kulturenan

de HONG ZHU

MI ŝatas vojaĝi al nacimalplimultaj loĝlokoj en landlima regiono de Ĉinio. La brilajn vestojn kaj ornamaĵojn de la nacimalplimultoj oni facile asocias kun pompaj plumoj de birdoj. En tio estas ia mistero. Mi ne scias, ĉu ili estas misteraj pro la beleco aŭ belaj pro la mistero. Jen kial mi ŝatas Yunnan-provincon, kie de antikve vivas multaj nacimalplimultoj — taj-oj, ji-oj, va-oj, baj-oj, lahu-oj, buji-oj, mjaŭ-oj, tuĝja-oj..., kiuj kiel

steloj formas “galaksion” sur la tero. Ni devas posedi tre abundajn sciojn por distingi ilian vivfonon kaj kulturenan tradicion. La tero estas plej proksima al ni, sed ne malpli mistera ol la ĉielo, ĉar la homaro sur la tero signifas pli komplikajn konstelaciojn. Yunnan vekis en mi amon al ĝia folkloro. Kiam mi eniris profunde en montaron loĝatan de diversaj nacimalplimultoj, mi kvazaŭ malkovris antikvan spegulon, en kiu speguliĝas antikvaj konstruoj, dialektoj kaj scenoj de ĉiutaga vivo. Hazarde renkontante homojn sur vojeto, mi povis

bone distingi ilin laŭ iliaj vestoj kaj ornamaĵoj kiel arbojn laŭ arbofolioj, kvankam mi ne konas iliajn lingvojn. Mi tre interesiĝas pri iliaj vestoj. Kvankam iliaj vivmaniero kaj ideologio modernigiĝas, tamen iliaj tradiciaj vestoj restas senŝanĝaj. Sur rivero sen navigacia marko flago estas signalo, kaj la jupo, zono, kufo, brodita saketo kaj arĝenta ornamaĵo konigas kiel ĉiamaj flagsignaloj: de kie mi venas, kien mi iras, kiu mi estas...

La nubo de Yunnan signifas ne nur naturan nubon, sed ankaŭ la kulturenan. La kolorriĉaj vestoj de nacimalplimultoj



Junaj lisu-oj en festaj vestoj

konsistigas la nubon de Yunnan: vaks-tinktura nubon, brodita nubon, silka nubon, kotona nubon... La heredita ligna teksilo en ĉiu hejmo estas la plej antikva ilo produktanta nubon. Ĉu la nubon en la ĉielo povas esti egale disdonita al ĉiu homo? Tamen ĉiu homo sur la tero ja deziras sian propran nubon, kiu sekvas kiel ties ombro. Vesto estas ombro de homo, ankaŭ ombro de nacio. Nun mi komprenas, kial Yunnan-anoj tiel adoras pavon — ĉar ĝi havas luksan veston, kiun la homaro ne povas imiti. Dum la tuta vivo ĝi prezentas modan veston al la homoj.

La sudaj trajtoj kaj akva spirito estas la alia kialo, ke mi ŝatas la nacimalplimultojn de Yunnan. Ekz. la Akverŝa Festo de taj-oj montras la intimecon kaj respekton al akvo. Taj-oj verŝas akvon unu sur alian en signo de beno. Kiel nubon kaj pluvo, la kanto kaj danco

de nacimalplimultojoj humidigas mian koron sekiĝintan pro la urba civilizacio. Hodiaŭ ni urbanoj nur scias modernan dancon, sed la nacimalplimultojoj de Yunnan dancas ankoraŭ laŭ ritmo kreita de iliaj antaŭuloj, rememorigante bivakfajron, tamburadon, svingiĝajn kapornamonojn kaj piedbraceletojn, akompanate de lignaj, bambuaj, eĉ ŝtonaj muzikiloj. Kompare kun ili, ni fariĝas kvazaŭ uloj perdintaj la memoron, almenaŭ la denaskajn kapablojn de kantado kaj dancado. Ĉu ni forĵetas la tradicion aŭ la tradicio forĵetas nin? Vizaĝe al la kantantaj kaj dancantaj nacimalplimultanoj mi hontas kaj sentas min kvazaŭ almozulo antaŭ riĉulo. Mi devas konfesi, ke ili konservas pli da homa naturo kaj primitiva beleco ol ni. Mi ekmemoras kunsidon de poetoj okazintan kelkdek jarojn antaŭe. Tiam poeto Xu Chi deklamis sian poemon "Sani-

oj", kiu konsistas el ok versoj kun instiga fino. Kiam li diris, ke estas pli ol 20 000 sani-aj muzikistoj, dancistoj kaj poetoj en Yunnan, li laŭte deklamis kun ekscitiĝo:

*Vi ne opiniu,
ke troviĝas jam cent mil
sani-oj,
sed nur dudek miloj da
sani-oj.*

La aŭskultantoj longe aplaŭdis la lastan strofon. Mi pensas, ke la aplaŭdo estas ne nur aprobo al la artisma strukturo de la poemo, sed ankaŭ respekto al la sani-oj, kiuj ĉiuj havas kapablon, kiuj ĉiuj havas diversajn kapablojn. La sani-oj estas unu el la multaj nacimalplimultojoj en Yunnan, lertaj en kantado kaj dancado. Se vi venos al Yunnan, vin infektos: en tiu antikva paradizo kanto kaj danco per sia kruda beleco. Ĉar ili estas la animo de la sani-oj, ili neniam perdiĝos... ■





Lernado de skiado



"Estu kuraĝa! Antaŭen!"



Purigado de la skiejo



Komencanto



Senneĝa skiado en Pekino

Teksto de LI CHUNGENG

Fotoj de ZHAO XI

Lastajn jarojn en Pekino malofte neĝis, do skiado estis ne ebla por pekinanoj. Tamen oni ne atendis, ke en la okcidenta antaŭurbo de Pekino konstruiĝis senneĝa skiejo Xiangshan, kiu jam altiris al si multajn skiamantojn. La skiejo estas farita per speciala tekniko el materialo de PVC-tabuloj, kies frot-koeficiento estas proksima al tiu de neĝo. Oni povas en ĉiu sezono kaj en ĉia vetero ĝui la ludon, kaj tiu ne nur estas sekura, sed ankaŭ donas al ili efektan kaj senton samkiel sur neĝo.

La senneĝa skiejo kiel granda subĉiela amuzejo tre harmonias kun la ĉirkaŭaj pejzaĝoj. Ĝi situas sur alta loko de la Pekina Botanika Ĝardeno ĉe Xiangshan-monto. Dum skiado oni povas ankaŭ spekti la pitoreskajn pejzaĝojn. La loko estas bela por turistoj kaj ideala por sportamantoj.



"Skiu kiel mi!"

Signifoplena ora medalo

Antaŭ la okuloj de la ĉeestantoj Xu finfine pafis la lastan kuglon

de XIANG HONG

ADIAŬI NULON EN LA OLIMPIAJ LUDOJ

“Restas nur tri kugloj,” iom da deprimiĝo aperis en liaj grandaj okuloj. “Se tiel, mi estos venkita.” Anstataŭ pafi, li mallevis la pafilon la kvaran fojon.

Malantaŭ li kolektiĝis ŝtatoĉiistoj, juĝistoj, trejnistoj kaj raportistoj. Sen bruado, ŝajne solidiĝis la aero. Estis sufoko en la decida momento. Tio okazis en Prado-pafejo de la 23-aj Olimpiaj Ludoj en Los-Anĝeleso en 1984. Ĉampioneco estis ridanta al ĉinoj, kiuj ne vidiĝis dum jaroj en la Olimpiaj Ludoj. Sed multaj homoj ne antaŭvidis tion.

Ĉinojn malĝojigis la karikaturo: Sub la kvin-ringa flago ĉino portas korbon kun ovoĵo. Ĝi kun titolo “Orient-azia Malsanulo” estis farita de iu fremdlandano antaŭ duonjarcento, ĉar la ĉinoj gajnis neniun medalon en la Olimpiaj Ludoj.

Antaŭ la okuloj de la ĉeestantoj Xu Haifeng finfine pafis la lastan kuglon. Kiam li demetis la pafilon, li ankoraŭ ne komprenis: “Pro kio tiom da homoj min ĉirkaŭas? Ĉu mi bone pafis?” Jes, ĝuste li pensis — Li gajnis la unuan oran medalon de tiu sportkunveno, ankaŭ la unuan por Ĉinio en la Olimpiaj Ludoj. Tial por ĉinoj la ora medalo estas signifoplena. Rememorante tion post 15 jaroj, Xu diris, ke se li pensus pri

gajno de tiu unua ora medalo, li malfacile tenus sin kvietan en la pafado.

APERIO DE ĈAMPIONO

Kvankam la 23-ajn Olimpiajn Ludojn partoprenis 300 ĉinaj sportistoj kaj inter ili ne mankis elstaraj, tamen la ĉina delegaciestro Huang Zhong ne kuraĝis esperi, ke ĉino gajnos la unuan oran medalon de la sportkunveno. Kiam en la pafkonkurso restis tri kugloj de Xu Haifeng ne pafitaj, Huang Zhong klare sciis, ke se tiuj 3 pafoj atingos almenaŭ 28 ringojn, Ĉinio certe gajnos la unuan oran medalon. Fakte 29 ringojn Xu Haifeng trafis. Sed kiam Huang sin alĵetis kaj brakumis Xu Haifeng, la lasta ankoraŭ ne konsciis, ke li fariĝis ĉampiono, ĉar li ne kontentis pri siaj lastaj 10 pafoj.

Ekster la ĉina kutimo Huang Zhong eĉ kisis Xu Haifeng. Li, ĉiam serioza kaj sinĝena, tiam ekscitite larmis kiel infano. Ekscitiĝis ne nur Huang Zhong, sed ankaŭ multaj aliaj ĉinoj, en kies okuloj estis entenataj larmoj jam jarcenton.

En Pekino, por konstati la informon pri la unua ora medalo, oni elĉerpis la ĝisdatan Pekinan Ĵurnalon.

La premiadona ceremonio estis prokrastata je 40 minutoj, ĉar ankaŭ la tria loko estis gajnita de ĉino kaj la organizantoj ne atendis tion kaj sekve ne preparis du ĉinajn naciajn flagojn. Ili devis prunti unu en la ĉina konsulejo.


Ankaŭ Xu Haifeng ne atendis, ke li povis la unua akcepti premion el la manoj de s-ro Samaranchi. Li ne havis kostumon taŭgan por la premiadona ceremonio. En la pruntita pantalono iom mallonga, li aspektis komika sur la premiadona podio. Tiu kostumo nun estas ekspoziciata en la Muzeo de la Ĉina Revolucia Historio.

IAMA “REĜO DE KATAPULTADO”

De la infaneco Xu Haifeng estas sprita kaj lerta en ĉiuj laboroj. Li diris, ke eĉ se li nun revenos en la kamparon, li ankoraŭ estos lerta laborulo. Tamen en sia infaneco li plej lertis en paser-kaptado per katapulto. (Tiam en Ĉinio pasero estis rigardata kiel fibirdo.) En lia naskiĝloko Hexian-gubernio de Anhui-provinco preskaŭ ĉiuj konas lian alnomon “Reĝo de Katapultado”.

Foje unu el la amikoj de lia patro informiĝis pri lia kapablo kaj proponis, ke li sin rekomendu al la loka pafteamo. Nelonge poste, en maniero de katapultado, Xu Haifeng sukcese trapasis ekzamenon far la trejnisto, en ridado de la pafteamanoj. Sur la celtabulo liaj paftruoj koncentriĝis, nur iom devie.

Duonjaron poste, li superis ĉiujn siajn samteamanojn. Tamen tiam li ankoraŭ apartenis al iu kemisterka fabriko, kiu ne volis, ke li foriru, pro lia oferta kapablo. Malfeliĉe, la kemisterka odoro terure malbonigis lian vidadon. Tio estis la ĉefa kialo, ke li poste frue finis sian pafistan karieron. Forlasinte la fabrikon, li sin okupis pri pogranda vendado de cigaredoj kaj alkoholaĵo en proviza kaj disvenda kooperativo. En mallonga tempo li fariĝis lerta en sia nova posteno, same kiel antaŭe, kiam li kapablis je ĉiuj kamplaboroj, eĉ je la tasko de



Xu Haifeng

vilaĝa kuracisto. Dum la jarfina bilancado li povis senerare fari kalkuladon per abako nur unufoje, dum aliaj plurfoje.

Tamen ĉiam kreskis lia deinfana fervoro por pafado. Finfine li refoje pruvis sian tiuflankan talenton en provinca sportkunveno: Per malnovtipa pafilo kostanta nur malpli ol 10 usonajn dolarojn li rompis la provincan rekordon, dum liaj samteamanoj uzis po unu svislandan pafilon kostantan 700 usonajn dolarojn. Jarojn poste, kiam iu germana trejnisto vizitis la lokan mizere ekipitan paf-trejnejon, kie Xu Haifeng siatempe akceptis trejnadon, li miris: "Estas neimageble, ke tie oni elbakis la mondan ĉampionon!"

Kiel unu el la provincaj sportistoj, Xu Haifeng unufoje partoprenis tutlandan sportkunvenon kaj gajnis la duan lokon. Nelonge poste li estis akceptita en la ŝtatan pafteamon. Malpli ol unu jaron poste, li gajnis per 566 ringoj la oran medalon en la Olimpiaj Ludoj je la sportbranĉo de vira 60-kugla malrapida pafado per

memelektita pistolo. Kaj lia nomo fariĝis sinonimo de la unua ĉina ĉampiono en la olimpika historio.

De 1993 ĝis nun, kiel

ĉeftrejnistoj de la ĉina virina pafteamo li elkulturis 5 mondajn ĉampioninojn. Li kredas, ke en lia listo de ĉampioninoj aldoniĝos novaj nomoj. ■

ABONKOTIZO DE *EL POPOLA ĈINIO* POR 2000

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgario	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Eŭro-landoj	EUR	12.80	16	28.80
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Nederlando	NLG	28	35	63
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne menciitaj supre pagu kiel Usono aŭ Nederlando.

2. Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko pagu kiel Brazilo; ankaŭ Hongkong pagu kiel Brazilo.

3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne menciitaj supre pagu kiel Bulgario.

4. La 11 EU-landoj kun eŭro kiel komuna mono povas pagi ankaŭ kiel Eŭro-landoj.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ valoron egalan al la pagenda sumo.

Kamparano-papertondisto Zhou He

La papertondaĵoj de Weixian estas faritaj per grifelo

de LAN SHAN

ZHOU He naskiĝis en papertondista familio en Nanzhang-vilaĝo de Weixian, gubernio de ĉinaj papertondaĵoj, en Hebei-provinco. Lia familio kaj tiu de Wang Laoshang, majstro de la papertondaĵoj de Weixian, estis en la sama korto kaj lia patro ofte faris interŝanĝon kun la majstro pri papertondado. Profunde influate de tio, infanaĝa Zhou He ofte imitis ilian papertondadon kaj memlernis la metion. Iom post iom, li enamiĝis en tiun folkloran arton. Diplomiĝinte el supera mezlernejo en 1972, li revenis en sian naskiĝlokon kaj tutanime okupis sin pri tia metio, decidante nepre krei ion novan por ĝi.

Dum pli ol 20 jaroj Zhou He ne nur mem faris papertondaĵojn, sed ankaŭ funkciigis fabrikon de papertondaĵoj kaj gvidis vilaĝanojn en tio. Dank' al lia klopodo, la fabriko pli kaj pli grandiĝis. Inspirite de la antaŭa generacio, Zhou He sinsekve projektis pli ol 300 specojn da novaj papertondaĵoj, kiuj jam ellandiĝis kaj vendiĝas sur la internacia merkato. Multaj el ili estas ŝatataj kaj konservataj de alilandanoj kiel popolaj artaĵoj de Ĉinio. Kaj Zhou He estis prezentita en ĵurnaloj. En 1997 la Ĉina Centra Televida Stacio speciale raportis pri liaj papertondaĵoj de vizaĝaj desegnoj en la programero pri pekina opero.

La papertondaĵoj faritaj de Zhou He plejparte temas pri personoj el mitoj, legendoj kaj dramoj, pri pavoj, gruoj, papili-

oj, ambirdoj, fiŝoj, floroj ktp. La personoj sur liaj papertondaĵoj estas versimilaj. Por doni la vivecon kaj vigecon al la homaj figuroj sur liaj papertondaĵoj, li aĵuris la buŝon, nazon, brovojn, okulojn, harojn, ornamaĵojn sur ĉapo, baskon kaj rubandon de jupo, kiuj impresas per siaj stereografieco kaj moveco. Nur kun elstara lertecon en la metio, oni povas fari tiel longajn kaj maldikajn kapharojn kaj lipharojn al la personoj de pekina opero sur la

ta, koloro bunta, desegno viveca kaj figuro versimila.

La tradiciaj papertondaĵoj de Weixian estas malgrandaj ornamaĵoj por fenestroj kaj pordoj. Heredante la tradician metiar-ton de papertondado, Zhou He donas apartan atenton al lernado el aliaj koncernaj artoj. Fine li posedas teknikon fari grandajn papertondaĵojn. Dank' al tio, la papertondarto estas uzata en pli kaj pli vasta kampo.

Kalendaro el papertondaĵoj

kun aparta loka koloro estas kreita de Zhou He. En la lastaj jaroj aperis en Ĉinio diversaj kalendaroj kun papertondaĵoj. Oni rigardas ilin kiel artaĵojn por donaco kaj konservado. Por ke la koloroj de papertondaĵoj ne paliĝu, Zhou He lernis de pentristoj kaj tapetistoj. Li ankaŭ tapetas papertondaĵojn kaj faras ilin rulaĵoj kiel murornaĵoj. Zhou He havas multajn bonajn ideojn kaj donas novan vivon al la antikva papertondarto.



Zhou He en desegno

Foto de LI QIANG

papertondaĵoj, ĉar ajna fuŝo difektas la tutan artaĵon.

La papertondaĵoj de Weixian estas faritaj per grifeloj en multaj procedoj konsistantaj ĉefe el du partoj, la unua estas grifelado kaj la dua — kolorigado. Por grifelado, oni unue stakigas dekojn da paperfolioj, metas sur ilin desegnojn, poste per konvenaj grifeloj faras la artaĵojn. Fininte la grifeladon, oni faras kolorigadon. Oni ofte uzas unu koloron en malsama denseco. Ekz., por ruĝigi unu floron, oni uzas ruĝon malhelan por ĝiaj pistiloj kaj ruĝon helan por ĝiaj petaloj. Tio postulas de la papertondisto elstaran lertecon. La papertondaĵoj de Weixian estas vaste ŝatataj pro la farado delika-

2000 estos la jaro de drako laŭ la ĉina luna kalendaro. De antikve Ĉinio prenis drakon kiel sian totemon kaj la ĉinoj sin rigardas kiel posteulojn de drako. Por esprimi siajn bondeziron kaj benon al la patrujo, Zhou He speciale faris papertondaĵon "Gigantaj Drakoj". Ĝia ĉefa parto konsistas el naŭ gigantaj drakoj, kiujn ĉirkaŭas 18 malgrandaj bildoj de ĉinaj vidindaĵoj kaj konstruaĵoj. La tuta papertondaĵo prezentas la temon "Leviĝas la ĉina nacio kaj flugas la gigantaj drakoj". Li planis fari la papertondaĵon "Ĉerivero en la Festo Klara kaj Brilo" laŭ la samnoma antikva pentraĵo de Ĉinio. ■

Du satiroj

Preskaŭ ĉiu ĉino konas fablojn de Ezopo. Eĉ centjaruloj kaj 5-6-jaraj infanoj scias la fablon pri vulpo, kiu diras, ke la vinberoj, kiujn ĝi ne akiris, estas acidaj. Ili bone konas la fablon pri ŝafido, kiu trinkis akvon ĉe rojo kaj estis formanĝita de lupo. Sed nur malmultaj bone konas la aŭtoron Ezopo.

Ezopo estis sklavo de aristokrato en la 6-a jarcento a.K. Li, saĝa kaj sprita, vojaĝis al multaj lokoj, liberiĝinte el la sklaveco. Li rakontis al homoj diversajn fablojn, verkitajn de li mem aŭ postlasitajn de antaŭuloj. Pere de la animitaj bestoj Ezopo malkaŝis la kruelecon de fortuloj, montris la naivecon de la bonkoruloj kaj admonis, ke la homoj devas esti homamaj kaj honestaj, venki malicojn kaj fari ĉion observante la naturan leĝon. Li malkaŝis ankaŭ la hipokritecon de kulto al la dio kaj pro tio oni puŝis lin de sur krutaĵo.

Li mortis, tamen liaj fabloj ne mortis. Historio notis, ke meze de la 14-a jc. iu okcidenta predikisto venis al Ĉinio kun fabloj de Ezopo. Poste en Ĉinio aperis la fabloj de Ezopo tradukitaj el la greka originalo kaj el la angla versio. En la lastaj jaroj aperis en Ĉinio diversaj eldonoj de tiu verko. Poeto Wu Zeqing adaptis la fablojn al satiroj, kiuj odoras ankaŭ ĉinan proverbecon kaj tre plaĉas al ĉinaj legantoj. Sube estas du el ili.

La Red.

Kapro kaj paŝtisto

Kapro forlasis la gregon,
Kuris tutsole sencele.
Fajfis paŝtisto kaj vokis,


Sed ĝin revoki ne povis.
La besto kuregis foren kaj foren.
La homo decidis puni ĝin severe,
Li prenis ŝtonon,
Ĵetis ĝin al la bruto,

Kaj rompĉis al ĝi la kornon.
Li maltrankvilis, ektimis
Kaj tremante indulgon petis:
“Ĝin al la mastro ne diru!”
Laŭte respondis la kapro:
“Ho, vi estas vere saĝa.
Mi tion ne diros, la korno neniam
perfidos.”

Vulpo senvestigita

Fanfaronis vulpo fiera
Pri sia vosto tre bela.
Se estos vosta konkurso,
Ĉampiono estos certe la vulpa.
Ho ve! Trafis ĝi kaptilon,
Kaj rompĉis al si l' voston.
Ĝi sentis sin humile,
Kaj vivis malfacile.
Ruza, ĝi konsilas al vulpoj aliaj
Tranĉi ĉiu sian voston:
“Por ni, ĝi superflua
kaj neniom beliga.
Mi preferas forigi ĝin
ol de ĝi ĉiam ĝenita.”





Mia patro

Mi fotas miajn gepatrojn

Teksto kaj fotoj de JIAO BO

Antaŭ ol mi lernis fotadon, miaj gepatroj havis nur unu foton faritan antaŭ pli ol 30 jaroj. Tio ne estas miriga, ĉar nia vilaĝo estis tre malriĉa kaj neniu havis tian deziron.

Poste mi forlasis la malriĉan vilaĝon kaj eklaboris kiel instruisto en urbo. En 1977, mi hejmen revenis kun fotoaparato. Miaj gepatroj karesis ĝin per siaj krudaj kaj sunbrunaj manoj kun granda miro kaj sur la vizaĝo legiĝis surprizo: "Kiel tiu skatolo povas kapti homajn figurojn?" Kiam mi levis ĝin por foti ilin, ili konfuzite rigardis unu la alian. Do, tiufoje la de mi faritaj fotoj pri ili plejparte estis malklaraj. Poste, mi plurfoje hejmen revenis kaj finfine sukcese fotis mian patrinon helpantan mian filon apenaŭ unu-jaran en ir-lernado, mian patron segantan kaj miajn gepatrojn kunestantajn.

Por fotado mi vizitis fabrikojn kaj vojaĝis al kamparo eĉ en feriaj tagoj. Poste, mi sukcesis en ekzameno por labori en redakcio de ĵurnalo kaj fariĝis fotisto. Kaj la de mi faritaj fotoj ofte aperis en ĵurnaloj. De tiam miaj gepatroj kutimiĝis al legado de ĵurnaloj. Ĉiam, kiam mi vizitis ilin, mi nepre faris fotojn por ili, dume ili jam fariĝis senĝenaj antaŭ mia fotoaparato.


Kun tempopaso miaj gepatroj maljuniĝis. En 20 jaroj, mi faris al ili amason da fotoj, kiuj rakontas iliajn vivon, ĝojon, malĝojon, morojn kaj ŝanĝiĝojn okazintajn ĉirkaŭ ili.

Septembre de 1994, mi, miaj edzino kaj filo revenis mian hejmlokon por festi la 80-jariĝon de mia patro. Post festeno mi fotis miajn gepatrojn kaj faris al ili tre belan foton. Do, mi grandigis ĝin en la urbo kaj sendis al ili. Poste, kiam mi refoje vizitis ilin, mi vidis, ke la foto pendas super ilia litkapo. Sube de la foto la patro skribis per peniko vortojn: "Foto Farita de Jiao Bo".



"Lasu min ĝui la motorbiklon!"





Mia patrino



Miaj gepatroj
ĉe la enirejo
de la vilaĝo



Mia patro admiranta la de mi faritajn fotojn publikigitajn en gazeto



Mia patrino gratas la dorson de mia patro.



"Ho, miaj piedoj doloras pro lacego."



Mia patrino misuzas la telefonon.



Miaj gepatroj kun iliaj
spikoj sur la kampo



Renkontiĝo kun aliaj maljunuloj



Miaj gepatroj kaj junaj geedzoj
el Kanado sur la Granda Muro



Miaj gepatroj antaŭ
Tian'anmen-pordego

Post transloĝiĝo en urbeto

Specialisto antaŭdiris, ke en la jaro 2000 Ĉinio havos 200 milionojn da superflujaj kamparanoj

Teksto kaj fotoj
de XIANG HONG

SHI Chaojiang, 67-jara kamparano, sidante antaŭ komputilo, per siaj dikaj fingroj mallerte frapis la klavaron kaj sur reto serĉis informojn pri prezo de agrikulturaj produktoj en diversaj lokoj de Ĉinio.

Shi riĉiĝis de transportado kaj vendado de agrikulturaj produktoj. Riĉiĝinte, li konstruis 4-etaĝan domon en urbeto. Krom mebloj li aĉetis ankaŭ du komputilojn. "Kial du? Unu jam sufiĉas!" La familianoj, precipe la edzino, malaprobis. Sed la rezulto montris, ke Shi pravis. Ekde tiam, kiam Shi enretigis siajn komputilojn, dome li povas akiri informojn: kie oranĝo riĉe rikoltiĝis kaj kie oni volas

aĉeti ĝin; kie mankas medikamento kaj kie ĝi estas akirebla. Laŭ tiuj informoj liaj filoj veturigis siajn kamionojn tutlande por transportado kaj vendado. Hodiaŭ Shi entreprenas pri konsultiĝo kaj rimarkinde enspezas.

Tion mi vidis dum mia intervjuo en la urbo Xiangfan, Hubei-provinco. Tie la nombro de enurbiĝintaj kamparanoj kia Shi jam atingis milionon, kiu konsistigas 25% de tiu de kamparanoj en la tuta urbo.

Do kial kamparanoj transloĝiĝis en urbetojn? Kion signifas la transloĝiĝo por ili mem kaj por la ŝtato?

En Ĉinio la vivo de urbanoj multe diferencas de tiu de kamparanoj. La kamparanoj plejparte vivas en vilaĝoj, kie la trafiko estas maloportuna, mankas kranakvo kaj elektro. La kam-



En legom-forcejo

paranoj vivis monotonan vivon labori ekde tagiĝo kaj ripozi post sunsubiro. Ili enviis la vivon de urbanoj: ĝui fadenan televidon, prepari manĝaĵon per gaso, havi propran klozeton. En la fino de la 70-aj jaroj Ĉinio ekpraktikis en la kamparo laŭkontraktan produktan sistemon, kaj la kamparanoj iom post iom bonhaviĝis. Pro altigo de produktaj fortoj pli kaj pli multaj superflujaj laboruloj forlasis agrikulturon. Specialisto antaŭdiris, ke en la jaro 2000 Ĉinio havos 200 milionojn da superflujaj kamparanoj. Se ili ĉiuj enirus en grandajn kaj mezgrandajn urbojn, do estus bezonataj 400 urboj kun 0.5 miliono da loĝantoj aŭ 200 urboj ĉiu kun miliono da loĝantoj. Tio estas ja nerealigebla. La kapacito de la nunaj urboj estas limigita. Kaj la grandaj kaj mezgrandaj urboj ne povas senbride akcepti kamparanojn, kaj



Novaj loĝdomoj
en urbeto



oni ne devas disvolvi urbojn malzorgante la kamparon.

Tial la efika rimedo estas transloki kamparanojn unue en urbetojn. "Limigi dilatiĝon de grandaj urboj, konvene disvolvi mezgrandajn urbojn kaj plene disvolvi urbetojn" estas strategio de la ĉina urbigo. Xiangfan en 1994 fariĝis unu el la eksperimentaj regionoj pri urbeto disvolviĝo en centra Ĉinio.

Laŭ lokaj kondiĉoj Xiangfan-anoj en 5 jaroj malfermis vojon "prosperigi urbeton surbaze de agrikulturo, kaj akceli agrikulturan produkton helpe de urbeto". La urbeto disvolviĝo estas vigla. Nun 40% de la vilaĝanoj de Xiangfan urbaniĝis kaj tio vekis atenton de multaj ekonomikistoj.

Mi vizitis 5 el la 300 urbetoj de Xiangfan, kiuj situas aŭ sur montetoj aŭ ĉe aŭtovojoj. Ili diferencas inter si per geo-

grafia dispozicio kaj industria strukturo, tamen ili ĉiuj profunde impresis min per la be-



Shi Chaojiang serĉas ret-informojn.

laj loĝdomoj kaj gajeco de la novaj loĝantoj.

La urbeto Kvin Montoj ricevis sian nomon pro tio, ke ĝi estas ĉirkaŭita de kvin montoj. Antaŭ 10 jaroj en la urbeto troviĝis strato malpli ol 300 m. longa kun nur 4 butikoj, 2 barbirejoj kaj ŝuflikejo. Sed nun antaŭ mi estas larĝa strato, vicoj da belaj

konstruaĵoj en antikva stilo kaj teo-butikoj. La tieaj loĝantoj vivtenas sin per kultivo, prilaboro kaj vendo de teo, pro kio la loko fariĝis fama en centra Ĉinio. Kaj nun ĝia urba kvartalo jam areo 1 km² kun 4 500 loĝantoj.

Gao Taiguo, 37-jara, antaŭe vivis en Tianhe-vilaĝo de la urbeto Kvin Montoj. Post 3-jara komercado de teo en najbara gubernio, en majo de 1998 li investis 100 mil juanojn por konstrui 3-etaĝan domon en la urbeto. En la vilaĝo li kultivis teon sur 3 hektaroj da kampo kaj dungis kelkajn laboristojn. Dum okupata tempo li kaj lia edzino loĝas en te-kultivejo kaj en senokupa tempo en urbeto domo. Ili vivas tre komforte.

Chenghe-urbeto situas sur ebenaĵo. Ĝiaj loĝantoj profitas de plektado de salikvergoj. La tieaj vilaĝanoj okupiĝas aŭ pri plektado de salikvergoj aŭ pri vendo de la plektaĵoj. Nun iliaj plektaĵoj vendiĝas en multaj landoj. Por pliproduktado la urbeto malfermis novan kvartalon, kie ĉiuj loĝantoj estis kamparanoj antaŭ kelkaj jaroj kaj nun okupiĝas pri tiu laboro. La urbeto areo nun jam duobliĝis kompare kun tiu en 1994.

En la urbo Xiangfan, multaj urbetoj samkiel Kvin Montoj kaj Chenghe disvolviĝis depende de iu ĉefa industrio. Ili havas belajn nomojn ekz.

"Urbeto de Teo", "Urbeto de Salikplektaĵoj", "Urbeto de Akvomelono", "Urbeto de Fruktoj" k.a.

Nun 80% de la loĝantoj de tieaj urbetoj antaŭe estis kamparanoj. Ili jam urbaniĝis kaj bonhaviĝis, sekve de tio ilia koncepto iom post iom ŝanĝiĝas. ■



La kunigita duringa pavilono en la parko Ĉiela Altaro

Foto de CONG XIANSHEG

PAVILONOJ

Laŭ ĉina arkitekturo oni rigardas pavilonojn kiel ornamaĵon. Ĉu por antikvaj ĝardenoj ĉu por naturaj pejzaĝoj la pavilonoj ludas apartan rolon. Kaj nun en Ĉinio estas multe da majstraj pavilonoj.

Laŭ formo estas plur-angulaj pavilonoj kiaj la tri-, kvar-, kvin-, ses-, kaj ok-angulaj, inter kiuj la kvar-angulaj simplaj kaj stabilaj estas la plej popularaj. Krome troviĝas ankaŭ pavilonoj ronda, oblonga, sektora, kruca kaj kombiniĝa. La kombiniĝaj pavilonoj estas diversformaj kaj tre interesaj. En la parko Ĉiela Altaro estas kunigita duringa pavilono. Ĝia horizontala sekco similas al paro da ringoj kaj la pavilono konsistas el du partoj kun similaj aleroj. Laŭ strukturo la pavilonoj povas esti dividitaj en unu-, du- kaj tri-etaĝajn. Ankaŭ la formo de

la tegmento estas grava por la pavilonoj. Ofte vidiĝas pinta duklina kaj kvarklina tegmento.

La pavilonoj estas ne nur aprezindaj, sed ankaŭ utilaj al turistoj. En la turisma urbo Hangzhou de Zhejiang-provinco videblas la bela Okcidenta Lago, sur kiu sidas Huiguan-pavilono riĉiganta najbaran pejzaĝon. Rigardante de tie oni klare vidas la belajn pejzaĝojn de la lago kaj Qiantang-rivero.

Ĉe pura akvo oni sentas sin kviete kaj komforte, tial pavilonoj ofte stariĝis ĉe rivero kaj en lago. Eĉ sur ponto videblas pavilono, kiu prezentas tavolecon de la konstruoj kaj riĉigas akvajn pejzaĝojn.

“HUIZHOU-A VIRINO”

“Huizhou-a virino” estas Huangmei-opero verkita de Huangmei-opera trupo de la urbo

Anqing, Anhui-provinco. Ĝia prezentado faris sensacion en Pekino.

Ĉinio abundas je teatraj heredaĵoj. Nun ekzistas pli ol 360 specoj de teatraĵoj kaj 50 000 tradiciaj teatraĵoj. En Anhui furoras Huangmei-opero, kiu karakteriziĝas per bela dekoraĵo kaj milda, oreplaĉa melodio. Lastajn jarojn ĝi fariĝis unu el la influaj operoj tra la tuta Ĉinio.

La “Huizhou-a virino” rakontas: Iu bela virino sole vivis post la edziniĝo sen edzo. Post kelkdek jaroj ŝia edzo revenis hejmen, akompanate de kromedzino. La “Huizhou-a virino” tre bele prezentas la simplan aferon antaŭ la spektantoj. Laŭdire la opero estis adaptaĵo de pentraĵoj kun simila enhavo kaj ĉiuj scenoj impresas kiel ksilografiaĵoj. Ĝi elspiras melodion el moderna orkestra muziko. La juna aktorino Han Zai-

fen en sia ludo montras belecon kaj elegantecon de orienta virino.

Kiam falas la kurteno, la "Huizhou-a virino" staras sole kun vizaĝo neesprimebla. La spektantoj kun larmoj aplaŭdas ŝin.

MALJUNAJ STELULOJ EN ĴAZTRUPO

Por ke la gastoj bone festu Kristnaskon, fama hotelo Paco de Ŝanhajo antaŭ kelkaj jaroj okazigis ĵazludon, en kiu la aŭskultantoj estis sorĉitaj de ĵazo el la 30-40-aj jaroj. Pro tio la ĵazludistoj ekfamigis.

La ludistoj plejparte estis emeritoj, inter kiuj la trupestro Zhou Wanrong aĝas pli ol 70 jarojn.

Antaŭ duonjarcento s-ro Zhou estis sendita al muzika lernejo, en kiu li lernis trumpetadon. Poste li ludis trumpeton en hoteloj de Ŝanhajo kaj Hongkong por celebra aktivado de fremdlandaj ambasadorejoj kaj konsulejoj.

Post naskiĝo de la maljunula ĵaztrupo s-ro Zhou fariĝis tre okupata. Li nun aspektas multe pli juna ol antaŭe. La 100 komponicioj ofte ludataj de la trupo ĉiuj estas bone konataj de li. Li diris, ke la komponicioj portis la aŭskultantojn en la pasintecon, sed lin en la novan vivon.

MEMORE AL LA 2550-A DATREVENO DE LA NASKIĜO DE KONFUCEO

Septembro de 1999 estis la 2550-a datreveno de la naskiĝo de Konfuceo. Memore al tio okazis en Ĉinio kaj aliaj landoj kaj regionoj multaj aktivadoj.

Konfuceo naskiĝis en Qufu de Shandong-provinco en 551

a.K. Li kaj Ŝakjamunio vivis en la sama epoko.

Konfuceo estis granda pensulo, politikisto kaj edukisto en la antikva Ĉinio. Kreinte konfuceanisman, li fariĝis reprezentanto de la ĉina tradicia kulturo kaj havis grandan influon en Ĉinio en la pasintaj pli ol 2 000 jaroj. Li ordigis kaj kompilis 6 verkojn, t.e. *Shi, Shu, Li, Yue, Yi* kaj *Printempo kaj Aŭtuno*, kiuj estis rigardataj kiel klasikaĵoj de konfuceanismo. "Analektoj de Konfuceo" estas granda verko, en kiu kolektiĝas vortoj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj.

Konfuceo opiniis, ke instruado konas neniajn kastojn. Li la unua starigis privatan lernejon. Laŭdire li havis 3 000 disĉiplojn kaj estis iniciatinto de edukado de ĉiuj popoloj. La kerno de lia ideologio estas "hom-amo" esprimata en etiketo. Li asertis, ke la homoj devas esti zorgemaj kaj helpemaj unu al alia.

Konfuceo estis respektata de monarkoj de ĉiuj dinastioj. En dinastioj Tang, Song, Yuan, Ming kaj Qing konstruiĝis pli ol 1 000 konfuceaj temploj en Ĉinio. Kaj najbare de la temploj oni starigis lernejon similan al Guozijian en Pekino.

Konfuceo havas grandan influon ne nur en Ĉinio sed ankaŭ en aliaj landoj. En Koreio ekzistas 232 konfuceaj temploj, kie ĉiujare oni okazigas aktivadojn, kaj kvarono de la koreoj kredas je konfuceanismo. En la 3-a jc. p.K. konfuceanismo enkondukiĝis en

Japanion, en kiu konserviĝas pli ol 30 konfuceaj temploj. En Kuala-Lumpuro troviĝas 93-jaran mezlernejo, omaĝe al Konfuceo, kie lernas 1 000 geknaboj. En Indonezio konfuceanisma asocio havas milionon da membroj. Krome ankaŭ en Britio, Germanio, Vjetnamio, Singapuro, Usono kaj aliaj landoj estas konfuceaj templo kaj lia statuo el kupro, ŝtono aŭ ligno.

En 1988 Nobel-premiitoj kunvenis en Parizo kaj deklaris: "Se la homaro volas bone vivi en la 21-a jarcento, ĝi do devas lerni konfuceanisman." Nun Konfuceo estas rigardata de UN kiel unu el la famaj personoj en monda historio kaj kulturo.



Konfuceo

“La Familio”

“La Familio” rakontas pri granda feŭda familio el kvar generacioj. Ĝi priskribas la amon inter gejunuloj, la kruelan persekuton de la feŭda etiko al virinoj kaj ilian tragikan sorton. La aŭtoro estas Bakin, fama ĉina verkisto kaj veterana esperantisto. Li modlis serion da karakterhavaj personoj per forta arteco kaj enkorpigis sian amon kaj malamon en tiujn rolojn de la romano por montri sian belan idealon.

1999. 572 p. 889 x 1230 mm. Ilus. Bind.


Prezo: 22.00 USD

Sendokosto: 5.00 USD

Mendu ĉe: ● Distribua Fako de EPĈ

● Libroservo de UEA

● Nia peranto en via lando



“Cent Ĉinaj Fabloj”

La libro enhavas cent fablojn el la antikva Ĉinio, kaj multaj el ili estis verkitaj de filozofoj, kio pliprofundigis la filozofion de tiuj fabloj. Delikataj ilustraĵoj donas artan plezuron de alia kategorio.

1999. 160 p. 787 x 1092 mm.

Prezo: 6.00 USD

Sendokosto: 2.00 USD

Mendu ĉe: ● Distribua Fako de EPĈ

● Libroservo de UEA

● Nia peranto en via lando

Kontribuaĵoj petataj por la konkurso “50 jaroj por EPĈ”

50 jaroj por

Esperanto

Paco

Ĉinio

En majo 2000 la redakcio de “El Popola Ĉinio” festos sian 50-jaran jubileon. En duon-jarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson “50 jaroj por EPĈ” kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun alilandanoj, impresoj pri kaj rilato kun Ĉinio kaj la revuo EPĈ...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajna stilo kaj ajna formo. Estas tre bonvenaj koncernaj

fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko “50 jaroj — EPĈ”. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.

● La 15-an de novembro 1999 Ĉinio kaj Usono faris duflankan interkonsenton pri la problemo, ke Ĉinio aliĝu al la Monda Komercita Organizo (MKO). Kvankam Ĉinio faris grandan cedon en la problemoj pri malfermo de merkato kaj mallevo de dogano k.a. por frue aliĝi al MKO, tamen ĝi firme tenis la starpunkton aliĝi al MKO nur kiel disvolviĝanta lando kaj neniom cedis koncerne la problemon de ŝtata suvereneco. Antaŭ nelonge la du flankoj finfine subskribis la interkonsenton. Tio signifas, ke Ĉinio faris firman kaj decidan paŝon survoje al aliĝo al MKO.

Nun la totala kvanto de eksportaĵoj de Ĉinio okupas la 9-an lokon en la mondo kaj havas pli kaj pli gravan influon sur la internacia merkato. Kiel disvolviĝanta lando Ĉinio devas fandi sin en la monda ekonomio, nur tiel ĝi estos lando promesplena. Ĉinio kaj MKO bezonas sin reciproke.

● En la lastaj jaroj herezaj organizoj aperis en iuj lokoj de Ĉinio, precipe Falungong, kiu malutilas al la homa vivo, socia stabileco kaj sekureco kaj kaŭzis seriozan rezulton. La Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko adoptis la "Decidon Nuligi la Herezajn Organizojn, Ilin Preventi kaj Trakti". La Supera Popola Kortumo kaj la Supera Popola Prokurorejo de Ĉinio faris juran klarigon pri la koncerna klaŭzo pri herezo en la Kriminala Kodo de la Ĉina Popola Respubliko kaj kelkaj problemoj tion koncernantaj. La 300-a artikolo de la kriminala kodo difinis punon de la herezaj organizoj, kiuj malhelpas praktikadon de la leĝoj, kaŭzas morton de homoj, atencas la sekson de virinoj kaj ĉantaĝas la naivulojn. Tio estas la leĝa bazo de la ĉina justico por nuligo de la herezaj organizoj kaj puno de ilia aktivado.

● Laŭ statistiko en septembro 1999, venis en Ĉinion



Alilandaj turistoj en Ĉinio Foto de WANG HUIMIN

53 255 600 turistoj inter januaro kaj septembro, je 14.6% pli multe ol en la sama periodo de 1998. Pro tio Ĉinio enspezis 10.308 miliardojn da usonaj dolaroj, je 11.82% pli multe ol en la sama periodo de 1998. Nun Ĉinio havas 5 782 hotelojn, el kiuj la stelaj estas 3 248 kun 764 600 ĉambroj.

Konforme al la rapida disvolviĝo de sia turismo, Ĉinio okazigos jarcentan vojaĝon al Ĉinio en 2000. Tiam Ĉinio liveros bonajn itinerojn, el kiuj la ĉefa estas "Mondaj Heredaĵoj de Ĉinio — mondnivelaj turismaj lokoj en la 21-a jarcento".

● En la jaroj de 1971 ĝis 1998 Ĉinio sukcese praktikis naskolimigon, ke la nombro de novnaskitoj malkreskis je 338 milionoj kaj la socio ŝparis 7 400 miliardojn da janoj, kiuj egalas preskaŭ al la totala produktovaloro de Ĉinio en 1997. En la severa situacio, ke la tutmonda homaro nombris 6 miliardojn, la koncerna internacia organizo kaj publiko laŭdis la ĉinan naskolimigon.

● La 26-an de oktobro 1999 oni nomumis astroidon, trovitan de ĉina astronomo, Astroido Bakin.

Bakin estas fama ĉina literaturisto kaj esperantisto. La Internacia Plumo honoris lin kiel unu el la dek famaj kulturaj eminentuloj de

la mondo. De la 20-aj jaroj ĝis marto 1998, kiam li ĉesigis sian verkadon, li publikigis grandan nombron da influaj verkoj. Liaj majstroverkoj estas trilogio: "La Familio", "Printempo", "Aŭtuno". La 25-an de no-

vembro 1999 oni solenis la 95-an datrevenon de lia naskiĝo.

● Fine de 1999 inaŭguriĝis la ambulatorio de la Tibet-medicina Hospitalo de Pekino. Pri tiu hospitalo nia revuo jam raportis en la novembra numero de 1997. La tibeta medicino kun aparta teorio estas grava konsistiga parto de la tradicia tibeta kulturo. En la historio ĝi ludis gravan rolon por la sano de tibetanoj kaj popolanoj en la najbaraj regionoj. La Tibet-medicina Hospitalo de Pekino fondiĝis en 1992. Ĝi estas la unika tia hospitalo en Pekino. En la 7 jaroj de post sia naskiĝo ĝi kuracis pli ol 300 000 homojn per tibeta medicino kaj tibetaj kuraciloj, inkl. de dekmil alilandaj malsanuloj el pli ol 30 landoj kaj regionoj. La tibeta medicino estas eminenta en kuracado de malsanoj de kardio-cerbaj sangvazoj, astmo, hepataj kaj galaj malsanoj, atrofia gastrito, reŭmatismo kaj reŭmatoidaj malsanoj.



Resaniĝinto kun tibet-medecinaj kuracistoj Foto de WANG HANPING

Bateti la tutan korpon

Batetu vin tutkorpe per via manplato aŭ pugno, kiam vi sentas viajn artikojn lacaj kaj rigidaj kaj viajn muskolojn streĉitaj

de REN ZHONG

TIO estas simpla kaj facile praktikebla korpo-sanigado, utila al firmigo de tendenoj, ostoj kaj muskoloj, al vigligo de artikoj, al sangocirkulado kaj al funkcio de la internaj organoj kaj metabolo. Batetu vin tutkorpe per via manplato aŭ pugno precipe en la tempo, kiam vi sentas viajn artikojn lacaj kaj rigidaj kaj viajn muskolojn streĉitaj, kio povas malstreĉi kaj vigligi vin fizike kaj spirite.

Oni batetas per frapilo el ŝtalaj dratoj aŭ sablosako, sed ĝenerale per la manoj.

Sube mi konigos 8 metodojn. Ili estas utilaj ne nur al mildigo de laco kaj sanigo de la korpo, sed ankaŭ al prevento kaj kuraco de iuj malsanoj. Faru tion konstante.

Unue. Batetu la kapon.

Faru tion starante aŭ irante. Malstreĉu vin tutkorpe, aparte viajn ŝultrojn kaj kubutojn kaj batetu vin starante. Se vi batetas vin irante, do iru malrapide kaj batetu vin senĝene. Batetu la maldekstran flankon de via kapo per via maldekstra manplato kaj la dekstran flankon per la dekstra. Faru tion de la frunto al la kranio, tien kaj reen sur ĉiu flanko po 50 fojojn. Kaj poste batetu la dekstran kaj maldekstran flankojn de via kapo po 50 fojojn. Faru tion atente kaj spiru nature.

Tio estas utila por mildigi kaj preventi kapdoloron, kapturton kaj sango-malsufiĉon de la cerbo.

Due. Batetu la suprajn membrojn.

Prenu la teniĝon kiel supre. Per via dekstra manplato aŭ pugno

batetu ĉiujn flankojn de via maldekstra brako de supre malsupren, de antaŭe malantaŭen, po 5 fojojn (5 batoj ĉiufoje). Same, batetu vian dekstran brakon per via maldekstra manplato aŭ pugno. Faru entute 100-200 batojn.

Tio estas utila por preventi kaj mildigi muskolan atrofion, malvigliĝon de la supraj membroj kaj hemiplegion.

Trie. Batetu la ŝultrojn.

Prenu la saman teniĝon. Batetu vian maldekstran ŝultron per via dekstra manplato kaj vian dekstran ŝultron per via maldekstra manplato. Faru tion po 50-100 fojojn.

Tio estas utila por preventi kaj kuraci artritron, muskolan atrofion ktp.

Kvare. Batetu la dorson.

Prenu la preparan teniĝon kiel supre. Batetu la maldekstran parton de via dorso per via dekstra manplato aŭ pugno kaj la dekstran per la maldekstra po 100-200 fojojn.

Tio estas utila al prevento kaj kuraco de dorsa doloro, kronika bronkito kaj malsanoj de pulmoj kaj koro.

Kvine. Batetu la bruston.

Batetu la maldekstran parton de via brusto per via dekstra manplato aŭ pugno kaj la dekstran per la maldekstra po 100-200 fojojn. Faru tion de supre malsupren kaj inverse.

Tio estas utila por preventi kaj kuraci malsanojn de koro kaj pulmoj.

Sese. Batetu talion kaj ventron.

Batetu viajn talion kaj ventron per viaj manplatoj aŭ pugnoj. Turnu vin dekstren kaj maldekstren kun via talio kiel la

Batetu la maldekstran flankon de via ventro per via dekstra manplato kaj la dekstran flankon de via talio per via maldekstra manplato. Batetu la maldekstran flankon de via talio per via dekstra manplato kaj batetu la dekstran flankon de via ventro per via maldekstra manplato. Per viaj du manoj batetu la supran kaj malsupran partojn de via ventro kaj la supran, mezan kaj malsupran partojn de via talio. Batetu ĉiun lokon po 100-200 fojojn.

Tio estas utila por preventi kaj kuraci doloron de la talio, ostoplazion, dispepsion, ventro-ŝveliĝon, mallakson k.a.

Sepe. Batetu la koksojn.

Batetu vian dekstran kokson per via dekstra manplato aŭ pugno kaj la maldekstran per la maldekstra po 50-100 fojojn.

Tio estas utila por preventi kaj kuraci malsanojn de koksaj muskoloj.

Oke. Batetu la malsuprajn membrojn.

Staru. Levu vian maldekstran gambon, farante viajn femuron kaj kruron ort-angula kaj tenante vian kalkanon sur la loko same alta kiel via femuro. Batetu viajn femuron kaj kruron per via maldekstra manplato aŭ pugno. Batetu la internan kaj eksteran flankojn de ili de supre malsupren po 5-10 fojojn (5 batoj ĉiufoje). Faru entute 100-200 batojn. Same, batetu vian dekstran korpoparton per via dekstra manplato aŭ pugno.

Tio estas utila por preventi kaj kuraci malsanojn de la gamboj, kiaj nesensiveco kaj senforteco.

Faru la ekzercadon milde kaj malforte en la komenco kaj iom post iom pli forte. ■

Poŝtmarkoj pri 12 aĝo-simbolantaj bestoj

La 1.2 miliardoj da ĉinoj apartenas al 12 kategorioj. Kaj kio estas tiuj 12 kategorioj? Ili estas 12 aĝo-simbolantaj bestoj, t.e. muso, bovo, tigro, leporo, drako, serpento, ĉevalo, kapro, simio, koko, hundo kaj porko. Laŭ tiu vico ili ĉiu reprezentas unu jaron alterne. Ekde 1980, la ĉina poŝto emisias ĉe la komenco de ĉiu jaro poŝtmarkon pri la rilata aĝo-simbolanta besto. Ĉar 1980 estas la jaro de simio, la desegno de tiujara aĝo-simbolanta poŝtmarko estas aminda simio. La poŝtmarkoserio estis finemisiita en 1991 kaj tre valoras, precipe la poŝtmarko pri simio, kiu ja fariĝis trezoro por filatelistoj pro ĝia malgranda emisiokvanto.





Lago kaj monto en Zhangjiajie

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》二〇〇〇年第一期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2